Komentoj, kritiko, debato?
http://zajn.togetherhost.com



*ri pene malfermis siajn okulojn kaj vidis, por la unua fojo en sia vivo, ri vere vidis. kia doloro. kia plezuro. freneze vivi.*

je libera prezo

# /zajn'/

#1

- revueto pri anarkiismo kaj alternativaj vivstiloj



- **pri sekso kaj malfermaj rilacioj**
- **la movado de sen-teruloj en Brazilo**
- **pri ekologia kooperativo en Kostariko**
- **intervjuo kun Indymedia**
- **l' intifado en Palestino**
- **fari vian propran sojlakton**
- **pirataj radioj - tiam kaj nun**
- **culture jamming, kaj pli...**

## Neniuj pardonpetoj, neniuj pentoj!

Komencis kiel ideo en eta ĉambro kolektiva en Svedio antaŭ du jaroj. Poste ni diskutis, vojaĝis, gajnis spertojn kaj amikojn. Finfine la tempo maturis por realigi la revon.

Jen revueto radikala internacia agigisma. Realiĝis per la kontribuo de multaj amikoj, Esperantistaj kaj ne – Dankon! Nun temas pri vi: legu, fordonu, agu, faru ion! Kaj lasu nin scii kion vi pensas (vidu lastpaĝe). Ĝis la nova mond'!

*Verkis tekstojn: Astrido, Daniel, Diedie, Espen, Foad, Kai, Kristine, Magda, Stian, Sveinung, Tage, Tifen, Tomio.*

*Ilustraĵojn: Magda, diversaj,*

*Tradukoj: Douglas, Espen, Kai, Stian*

*Kunordigis, paĝdesegnis: Stian kaj Espen*

*Por ajnaj informoj, kontaktu shaklev@gmx.net*



# Enhavo

Anarkiismo

Manifesto

L' Intifado

Ni rajtas esti pli ol 2

Kiaj elementoj ebligas sukceson al malfermaj rilatoj

Culture jamming estas pli ol spoof-ads/ anti-reklamo

Novaĵoj el Indymedia

Amo kaj sekseco

Kulturado por kreski

Tiel ĉi vi afiŝas

La movado de sen-teruloj

Radio 'stas mia bomb'!

La marbordana saĝeco

Anarkio en UK

Estas diferenco inter vivo kaj travivo

Herba folio


Indymedia en Brazilo


Puntamona

Sojlakto

La kulturo de alkoholo

La enhavo de via taga vivo






# FORDONU TIUN ĈI REVUETON!

En 1971 kiam Abbie Hoffman eldonis libron pri kiel vivi sen uzi monojn kaj subteni la kapitalisman socion, kian alian titolon li povus elekti ol *"Steal this book"* (Forŝtelu tiun ĉi libron)? Tion vi ne povas kun zajn' kiu estas vendata je libera prezo, do ni ŝanĝas la sloganon al: Fordonu tiun ĉi revueton. Ekde kiam mi sidante sur la transsiberia fervojo malfermis libron pri radikalaj universitatoj hipiaj skribitan en Usono en la 70-aj, aĉetita en hipia uzitlibrejo en Egiptio, kaj malkovris la stampon de dungito ĉe La Monda Banko, mi decidis ĉiam kiam mi havas gravan kaj interesan libron, skribi mian nomon kaj daton sur ĝi, kaj doni al alia, kun la promeso ke li/ŝi faros same finleginte.

Ni volas ke plej multaj povu legi tiun ĉi revueton, ĉar ni kredas kaj esperas ke ĝiaj ideoj estas gravaj kaj inspirigaj, sed ni ne havas la aparaton por plurobligi ĝin centmilfoje kaj distribui ĝin al grandaj supermerkatoj tutmondaj – nia aparato estas vi! Leginte tiun ĉi revueton, vi donas al alia intersatulo, kun la promeso ke ŝi/li same faros. Tiel unu revueto inspirigos multajn, kaj ne kovriĝadas de polvo en iu

| Nomo | Lando | Dato finleginte |
|---|---|---|
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |



## Vi estas la nova redaktisto!

Kiam eldonatos la sekva numero? Neniu ideo – espereble ni tro okupiĝos pentri stratojn ruĝaj kaj fondi ekologiajn kooperativojn en Latin-Ameriko por sidi fronte al ekrano dum tagoj kaj noktoj desegnante paĝojn por via plezuro – pro tio ni tre fieras publike anonci ke VI estas la nova ĉefredaktisto (ĉar ni ne ŝatas ĉefojn, vi prefere kunprenu kelkajn el viaj amikoj kaj formu redaktan kolektivon). - Vi rajtas utiligi ĉiujn rimedojn, inkluzive ŝteli ideojn de la plej grandaj pensiuloj vivintaj kaj vivontaj, senkompromise kreemi, menzogi kaj inventi, kaj plej grave; revi!

Kiam mi sidante sur trajno tra orient-Euxropo ricevas de punkulo revueton "zajn' #2", mi scios ke la semo de revolucio jam elkreskis!

*(Kompreneble, se vi bezonas helpon, aux povas kunhelpi, vi povas ankaux kontakti min, kaj eble ni povas ion fari kune, aux peri kontakton! Skribu al shaklev@gmx.net. Ĝis la nova mond'!)*

# la enhavo de via TAGA VIVO

de Crimethinc

Kiom da horoj tage vi uzas sidante antaŭ televidekrano? Komputilekrano? Antaŭ aŭtomobila frontfenestro? Ĉiuj tri ekranoj sume? Kiom de via vivo alvenas al vi de malantaŭ ekrano aŭ fenestro, hazarde?

Ĉu vidi agojn estas same ekscite kiel fari mem? Ĉu vi havas sufiĉan tempon por fari ĉion kion vi volas fari? Ĉu vi havas sufiĉe da energio? Kial? Kaj kiom da horoj tage vi dormas? Ĉu vi estas afekciita viktimo de normigita, regulizita tempo, farita sole por sinkronigi viajn agojn kun tiuj de miliono de aliaj homoj? Kiom longe vi povus resti sen scii kiomas la hor'? Kiu aŭ kio kontrolas viajn minutojn kaj horojn? La minutojn kaj horojn de kiuj via viv' konsistas? Ĉu vi ŝparas tempon? Ŝparas por kio?

Ĉu vi povas valorigi belegan tagon, kiam la birdoj kantas kaj la homoj kune ĉirkaŭpromenadas? Kiom da dolaroj hore vi postulas por stari endome vendante aferojn, aŭ movante paperpecojn? Kion vi poste povas ricevi por kompensi tiun ĉi tagon de via vivo?

Kiel efikas sur vin esti ĉiam en homamasoj, ĉirkaŭata de sennomaj aroj? Ĉu vi senscie blokas vian emocian respondon al aliaj homoj? Kaj kiu preparas viajn manĝojn? Ĉu vi foje manĝas sola? Ĉu vi foje mangas staranta? Kiom vi scias pri tio kion vi manĝas, kaj de kie ĝi venas? Kiom vi fidas je ĝi?

Kiom rabas de ni niaj laborŝparaj iloj? Niaj pensŝparaj iloj? Kiel afekcias vin la postuloj de efiko, kiuj valorigas la produkton anstataŭ la proceson, la estonton anstataŭ la estanton, la tujnuna momento iĝas pli kaj pli mallonga dum ni akcele rapidas en la futuron. Al kio ni rapidas? Ĉu ni ŝparas tempon? Ŝparas ĝin por kio?

Kiel afekcias vin movi ĉiam en preplanitaj trajektorioj, en liftoj, busoj, metrooj, aŭtomataj ŝtuparoj, ŝoseoj kaj trotuaroj? Moviĝi, loĝi kaj vivi en du kaj tri-dimensiaj retoj. Kiel afekcias vin esti organizita, malmovebligita, kaj tempoplanita anstataŭ vagi libere kaj spontane? Traserĉi la rubujojn (ŝteli en butikoj)? Kiom da libereco de movado vi havas – libereco (de) movi tra spaco, movi for kiom vi volas, en novajn kaj neesploritajn direktojn?

Kaj kiel afekcias vin atendado? Atendi en vicoj, atendi en trafiko, atendi (la) manĝadon, atendi (la) buson, atendi por pisi – lernante puni kaj ignori viajn spontanajn impulsojn? Kiel afekcias vin reteni viajn dezirojn? Per seksa repuŝo, per forneo de plezuro, komencanta en la infanaĝo, kune kun la subpremo de ĉio en vi kio sponantas, ĉio kio evidentigas vian sovaĝan naturon, vian membrecon en la besta regno? Ĉu plezuro danĝeras?

Ĉu danĝero povus esti gajiga? Ĉu vi iam bezonas vidi la ĉielon? (Ĉu vi povas ankoraŭ vidi tie multajn stelojn?) Ĉu vi kelkfoje bezonas vidi akvon, foliojn, bestojn? Rebrilantajn, movantajn, lumetantajn? Ĉu pro tio vi havas dorlotbeston, akvarion, domajn plantojn? Aŭ ĉu via televidilo kaj videoaparato estas via rebrilo, movo, lumeto? Kiom de via vivo venas de malantaŭ ekrano aŭ fenestro, hazarde?

Ĉu afekcias vin la senĉesa atak(AD)o de simbola komuniko – sona, vida, presa, grandafiŝa, radia, videa, robotvoĉa – dum kiam vi vagas tra arbaro de signoj? Kion ili antaŭenpuŝas al vi? Ĉu vi iam bezonas solecon, kvietecon, kontemplon? Ĉu vi memoras ĝin? Pensi por vi mem, anstataŭ reagi al stimuloj? Ĉu malfacilas rigardi alidirekten?

Ĉu rigardi alidirekten estas ĝuste la ago kiun oni malpermesis? Kien vi povas iri por trovi silencon kaj izolecon? Nenian blankan bruon sed puran silenton? Ne solecon sed mildan izolecon. Kiom ofte vi haltis por demandi tiajn demandojn al vi mem? Ĉu vi senscie faras agojn de simbola perforto? Ĉu vi foje sentas vin tiom sola ke vortoj ne povas esprimi ĝin? Ĉu vi foje sentas vin preta **PERDI KONTROLON?**



# Anarkiismo - kio estas?

*Steve / Usono*

Anarkiismo estas filozofio politika kiu ĉirkaŭbrakumas demokration kaj liberecon, kaj celas detrui ĉiujn tipojn de devigo kaj subpremo. La homa subpremo radike konsideratas esti malegaleco. Pro tio estas la perfekta ilo ideologia por detrui malriĉecon, rasismon kaj seksismon. Ĉiuj ĉi estas povo-sistemoj bazitaj en hierarkio. Hierarkio signifas desuper-suben, kiel piramido. Konstruaĵoj de povo-hierarkioj kreas poziciojn de relativa privilegio kaj relativa subpremo. Kapitalismo, blankula supereco kaj patriark-reĝima supereco ankaŭ estas desuper-suben-povkonstruaĵoj.Anarkiismo havas malsaman ideon pri povo. Anstataŭ *povo super*, Anarkiismo proponas *povo kun*; kunlaboro. Tio ĉi signifas ke socialaj sistemoj kaj institucioj devas esti bazataj sur kunlaboro, kaj povo restu ĉe la individuoj kaj la kolektivoj al kiuj ili libere asociiĝas.

**Anstataŭ povo super, Anarkiismo proponas povo kun; kunlaboro.**

Anarkiismo volviĝas ĉirkaŭ kvin bazaj principoj: 1) egaleco; 2) demokratio; 3) libera asociado; 4) reciproka helpado; 5) diverseco. Egaleco povas havi plurajn signifojn. Koncerne nia anarkiista filozofio, temas pri egaleco rilate al povo. Ne signifas ke ni deziras tute novan socion bazita sur totalisma visio de ĉiuj aspektantaj kaj farantaj la saman – fakte en diverseco ni vidas forton. Anstataŭe ni opinias ke ĉiuj havu egalan aliron al la povo decidi kiel oni volas vivi. La plej bona maniero instituciigi povon estas per diversaj formoj de demokratio.

Demokratio estas malklara ideo, sed ĝenerale ĝi celas povigi ĉiujn por havigi al ili egalan voĉon en decidoj kiuj afektas iliajn vivojn. Tio nur validas se kovras ĉiun parton de la sociala vivo. Kapitalismo estas nedemokratia, precipe kiam ĝi estas kombinata kun rasismo kaj seksismo.

Libera asociado estas la principio ke individuoj ne estu devigataj partopreni socialajn aranĝojn kontraŭ iliaj voloj. Se oni naskiĝas en malriĉecon en la nuna mondo, plej verŝajne vi mortos malriĉa. En anarkiista socio, kolektivoj por ĉio, kio estas dezirata de homoj, estas kreitaj de homoj libere kuniĝintaj, kun egala povo por decidi la futuron de la socio. Tiu ĉi vizio kovras ĉiujn socialajn aranĝojn – ekde vian najbararon, al la urbon, la ristoraciojn ktp.

Ni kredas ke povo devas baziĝi sur la radikoj, kaj ke organizaĵoj devus iri desub-superen, sed ni komprenas ke nia fokuso devas esti tutmonda. Por pligrandaj formoj de organizado trans la loka nivelo ni pledas por federacioj de liberaj kolektivoj. Tiuj ĉi povos kunordigi malsamajn aferojn kiel rubaĵmastrumado, komputila tekonologio, naturaj rimedoj, defend-armeo aŭ produktado. Ili baziĝos sur la samaj anarkiistaj principoj; sed agos per delegitoj de la kolektivoj, anstataŭ ol ĉiuj membroj de ĉiu kolektivo. Delegitoj, en anarkiista kompreno, ne estas karieraj politikistoj, sed membroj dumtempe elektitaj por reprezenti kolektivon pri specifa afero.

La du lastaj principoj rilatas al unu la alian. Reciproka helpado estas alia esprimo de kunlaboro, sed havas pli specifan signifon. Reciproka helpado estas la kultura idealo, opozicie al konkurenco. Kiam homoj laboras kune, ili atingas multe pli ol kiam ili laboras unu kontraŭ la alia. Socialaj organizaĵoj devus ĉirkaŭbrakumi kaj admoni tion ĉi.

Diverseco estas ŝlosilo al travivo en la futuro. La moderna emo normigi ĉion kaj apliki la produktigan lineon al ĉiuj flankoj de la sociala vivo lasis multajn fremdigitajn kaj senesperajn. Tiu emo estis ankaŭ grandparte respondeca pri la detruo la medio. Diverseco estas organizoformo pli ekologia. Anstataŭ provi konformigi la realon al la ŝtat-burokrataj ideoj de ordo per trudo de aŭtoritato, anarkiistoj komprenas ke socialaj organizaĵoj funkcias pli efektive por la koncernataj homoj se tiuj homoj havas la povon formi ilin tiel, kiel ili volas. Do, anarkiistoj apogas diversajn formojn de demokratio, familia organizado, produktado, dancado, amado, manĝado, ĉio ajn. Kiam homoj vivas diverse ili interagas en natur-simila maniero. Aldone pli malfaciliĝas regi ilin.

**Do, anarkiistoj apogas diversajn formojn de demokratio, familia organizado, produktado, dancado, amado, manĝado, ĉio ajn.**

**Bv. presu tiun ĉi artikolon sur flugfolioj kaj kopiu! ĝin al retpaĝoj!**

# Manifesto

komence estis nur kelkaj notoj al mia amiko, sed eble plej bone lasi vin vidi senredaktite

To: imf@start.no

From: shaklev@gmx.net

Date: 28.05.2003 09:50

Topic: Manifesto

Manifesto por zajno

- krei artaĵon
- krei arton
- krei

”Krei zajno estas en si mem ago de defio. Ni ne kontentas esti pasivaj konsumantoj, digestante la produktadon de aliaj (sed ne individuoj, ne amikoj aŭ nejbaroj, sed korporacioj, reklamaj firmaoj), kion ili enŝovas niajn buŝojn. La mondo estas kompleksa reto de atomaj agoj kaj interagoj kies signifo difinitas de la produktantoj de amasmedioj – ni ne akceptas iliajn signifojn kaj strukturojn. Ni ne estas atomaj individuoj en eterna lukto por sukceso, kie feliĉo mezuras en mono kaj la homoj sur kiuj vi staras. Kun niaj amikoj kaj partneroj, amantoj kaj kamaradoj, ni reinterpretos la mondon, kreante niajn proprajn ritojn kaj mitojn, teksas reto de interdependeco, kreante signifon. Ni produktas – duflanke, ni produktas signifon, pensojn, analizon, ideojn – kaj ni produktas fizikan revuon, peco de arto kaj peco de amo.”

Ideoj por la enhavo (tamen la enhavo kreiĝas dum kiam ni kreas – kaj tielvidite la krea proceso fari revuon estas en si mem artaĵo)

• DIY (faru vi mem) artikoloj pri rubujtraserĉado, memfari propran manĝaĵon (panon, humuson, lentan smiraĵon), memkudri viajn proprajn vestaĵojn (fari saketon de malnovaj pantalonoj – mia nuntempa projekto)

• Analizo de la nuntempa mondo, kun revoluciaj ebloj (seksaj rilatoj, malfermaj amrilatoj, edukaj strukturoj (Focault?), ĉio ajn kion ni povos trovi)

• Inspirigaj rakontoj de kreema kontraŭstaro ĉie etc (miaj historietoj de Lund (reprenu la stratojn, pentri sur la grandan placon), la cirkolo de interŝanĝo – ĉio, radikalega aŭ nur hipiema, ĉi tie ni devas konekti kun homoj kiuj havas historioj por rakonti)

• Veganaj receptoj

• Intervjuoj/temoj – Atilio pri novaj edukaj metodoj, crimethinc? Brazila IMC, Sjur (estis en Irako kun homaj ŝirmoj, baldaŭe revenos al Oslo, laboras ĉe Hausmania, okupigita kultura centro), Briano, Torun, Jomo kaj la Liberec-anoj!

• Libropriskriboj – Tagoj de milito, noktoj de amo (Crimethinc), libro pri participa ekonomio, Jomo kaj la liberecanoj, Chumbawamba, multege da!

(la kialo pro kiu ŝajnas ke mi skribos ĉiun artikolon estas ke mi plej facile povas imagi pri kio mi mem povus skribi – ideale multe da homoj skribus pri aferoj... ankaŭ provu esti internacia!)

ktp.

• bonegaj artaĵoj



nek vidas nek priscias aliajn eblecojn renkontiĝi amuziĝante, sed "devas" drinki.

Alkoholo kontribuas al malgrandigo de la sencopleneco de la sociala vivo, parte ĉar ĉio, kio pritemas alkoholon, iĝas surogata konversaciaĵo. Eble tio estas efektiva maniero komenci kaj vivteni interparoladon; "kiom", kion", "kiom ebria" ktp. kreas nova mondo de absurdaĵoj. La ebrieco kontribuas al tio ĉi, per la fakto ke la konversacioj platiĝas paralele kun la kresko de la promilo de alkoholo en la sango. Eble tio ŝajnas negrava, sed la rezulto estas ke homoj estas kaptitoj (de si mem!); dum la semajno ili laboras, kaj en la semajnfino ili drinkas ĝis ili povas plu. Tiel, ĉiuj ĝermoj de ribelo kontraŭ la nunaj ekonomiaj strukturoj, kiuj ekspluatas la nian laboron, estas efektive sufokitaj.

## La domaĝoefektoj de alkoholo

http://www.rusfri.no/avhold.htm

Neniu alia unuopa faktoro estas envolvigita en tiom multe da

• malsanaĵoj (de la hepato, pankreaso kaj nervosistemo, kancero k.a.)

• psikaj kaj interhomaj problemoj

• domaĝaĵoj kaj akcidentoj hejmaj kaj trafikaj, dronoj, frostiĝoj kaj bruloj,

• perfortaj krimoj (80-90% de ĉiu perfortkrimo estas farita ebrie) kaj memmortigoj.

**"Senalkoholaj" alkoholaĵoj**
Mi plurfoje skribis ”alkoholo” sen diri kiun signifon mi aldonas la terminon. Kutime la vorto inkluzivas trinkaĵojn kun etanolo (drinkaĵoj). (Etanolo estas tiu substanco, kiu igas nin ebriaj.) Mi asertas ke pro la speciala statuso de alkoholo, ankaŭ senetanoligitaj kaj similaj anstataŭaĵoj oni konsideru, almenaŭ parte, kiel "alkoholo". Se oni elektas trinki tion, oni kontribuas al la subteno de la statuso de alkoholo, ĉar oni admitas ke oni "bezonas" "ian" alkoholaĵon. Se ĉiuj trinkus senetanolajn "alkoholaĵojn", la problemo estus multe pli malgrande, sed dum kiam tio ne estas la situacio, tia ago kontribuas al la statuso de alkoholo.

**“Lasu nin krei novajn, socialajn frekventmanierojn kiuj transpaŝas konatajn dikotomiojn."**

**Respondeco**
La problemoj pri alkoholo kutime atribuatas al "ili", bazita de la klasika divido "ni" kaj "ili". La problemoj apartenas al "ili" kiuj ne povas limigi sian alkoholkomsumadon, "ili" kiuj perdas la kontrolon kiam ili ebriiĝas. Tiu ĉi vidpunkto certe estas komforta por kelkaj, sed ne sufiĉa. Unue, kiuj estas tiuj ĉi "perditaj" uloj al kiuj mankas kontrolo? Ili estas inter ni ĉiuj; ofte ili estas ordinaruloj kiuj ial, iel, akiras problemojn. Plue, la statuso de alkoholo estas fundamente por la vasta konsumado, kaj pro tio parte respondecas pro la misuzo. Kaj la statuso de alkoholo, kaj la konsumado de alkoholo entute, estas vivtenitaj de ĉiuj, kiuj drinkas. La alta statuso de alkoholo plioftigas la drinkadon, kaj pro principoj de probableco, kelkaj elcentoj de la trinkantoj evoluos misuzon de alkoholo, krom la pli ĝeneralaj problemoj ne rilataj al misuzo. Pro tio, ĉiuj drinkulo kontribuas al la grandaj kaj malgrandaj problemoj de alkoholo (kune kun la hegemonia pozicio de alkoholo en la festenkulturo).

**Kion fari?**
Do, vi demandas; kion fari? Kio estas la alternativo? Unue mi volas diri ke miaj kritikaj komentoj ne postulas totalan abstinencon, kvankam mi opiniias ke estas bona, simboloplena ebleco. Plej gravas esti kritika pri sia propra komsumo, kaj eble cedi drinki de temp’ al tempo. Tiel oni montras ke oni ne (sociale) dependas de alkoholo, kaj helpas malkreskigi la statuson de alkoholo. La fundamento de la problemo tamen baziĝas en la strukturo de la festena kulturo. Kaj kiel la socio funkcias hodiaŭ, ne estus modere postuli ke neniu drinku. Ni devas krei alternativon; montri ke eblas renkonti geamikojn, flirti, danci, kaj amuziĝi sen ekskuzoj de ebrieceto. La efekto de etanolo povas esti kreita de la etoso de festenoj. Ni devas ne nur permesi, sed fari tiel ke la *normo* por festeni estas ke oni "riskas" iom; ke oni seninhibiciiĝas, sen kaŝi sin malantaŭ glaso da biero.

Se alkoholo rajtas dikti la premisojn por kion homoj faru en sia libera tempo, la spontaneco kaj kreemeco kio jam ekzistas, pereas kune kun kapdoloroj kaj naŭzoj. La nova festenkulturo ne estu kreita ĉirkaŭ alkoholo kaj ties mallarĝa mondo, sed ni kreu novajn manierojn frekventi unu la alian en ejoj kaj festenmanieroj kiuj inspire stimulas, ne male (kiel hodiaŭ). Lasu nin krei novajn, socialajn frekventmanierojn kiuj transpaŝas konatajn dikotomiojn kiel ordinara tago/festeno, publika/privata, sen droni en apatiiga ebrieco kiu forigas la pikilon de sociala revoltado kaj subtenas la neeltenecon de la ordinara tago. La fenomeno Reprenu la Straton (angle: Reclaim the Streets) estas bona ekzemplo de tio. Per plimalpli spontana kuniĝo en strato kutime uzata de aŭtoj, ludante muzikon, dancante, ludante futbalon, desegnante sur la asfalto, ĵonglante kaj teatrumante, aŭ nur babilante, umante, oni redefinas la publikan ejon al ejo por festeno kaj kontakto inter homoj.

# La kulturo de alkoholo

*Espen / Norvegio/Svedio (imf@start.no)*

Alkoholo ludas duoblan rolon en nia socio, aŭ alidirite, ekzistas du diversaj manieroj rilati al alkoholo. Unuflanke alkoholo estas en la centro de socia vivo, kaj funkcias kiel ilo por festeni kaj amuziĝi, aliflanke estas gravaj sanaj, socialaj kaj aliaj problemoj ligitaj al alkoholo. En tiu ĉi artikolo mi asertas ke oni ne povas teni tute disigitajn la du flankojn, la hegemonian pozicion de alkoholo estas la ligilo.

**Problemoj pri alkoholo**
Alkoholo kulpas pri pluraj sanproblemoj en nia socio, kiel hepata cirozo, veneniĝo pro hjemefarita brando miksita kun metanolo, nur por mencii kelkajn (vidu kadron). Sed eble la plej gravaj problemoj estas la socialaj. Kelkaj de ili efikas reciproke kun alkoholo, fortigante unu la alian, kiel ekz. senlaboreco. Seksa perforto, infan- kaj virinbatado estas rezultoj kiuj precipe afektas inojn. Plejofte viroj estas viktimoj de alkoholrilata perforto malfruvespere urbocentre. Ebria veturado forprenas multajn vivojn ĉiujare. Alkoholo (efektive etanolo, la efikaĵo en alkoholaĵoj) havas apatian efikon, kaj deprenas de la ebriulo la kontrolon. Kiam infanoj eniras la mondon de l' plenkreskuloj kaj volas agi kaj esti kiel tiuj, ili kompreneble baldaŭ ekdrinkas. Pli aĝaj junuloj kaj plenkreskuloj konsistigas la idealon por la junuloj, al kiuj ne ofertatas alternativaj manieroj renkontiĝi kaj amuziĝi.




**La statuso de alkoholo**
Konsekvenco ŝajne malpli grava de la alkoholkonsumo estas ke alkoholo estas necesaĵo por festenado. Alkoholon oni komprenas kiel necesa ilo por amuziĝi ĉe festenoj. Se oni iros al festeno, oni "devas" kunporti drinkaĵojn, kaj drinki. Tiel, granda drinkopremo nedirekta estas kreita, kaj la senkonkursa pozicio de alkoholo en tiuj ĉi kontekstoj igas alternativajn manierojn por sociala ĝojo kaj festenado preskaŭ tute neekzistantaj.

Per la fortaj ligoj inter alkoholo kaj la festena kulturo, kune kun la manko de alternativoj, "alkoholo" akiras specialan statuson. Ĉio, kio estas alkoholo, estas valorigita *ĉar* estas "alkoholo". Tio ĉi, kune kun la vasteco de la alkoholkulturo, rezultigas ke la alkoholo akiras hegemonian pozicion en festenaj kuniĝoj; ĝi estas ege dominanta kaj difinas la kadrojn por festeno kaj similaj aranĝoj.

Oni povas diri ke "alkoholo" konsistas el tri elementoj: gusto, ebriilo kaj statuso/kulturo. Tiuj ĉi ne povas esti disigitaj en realeco, sed ili estas gravaj sur analiza nivelo. Kompreneble oni rajtas opinii ke alkoholo bongustas (same kiel multaj aliaj trinkaĵoj). Ties ebriiga efekto estas laŭdita de multaj, sed ne estas senproblema. Sed plej grava estas la statuso de alkoholo; ties rolo en la kulturo kiel kadro por sociala umado. Tio ĉi elemento de "alkoholo" donas al ĝi surogatan funkcion; alkoholo iĝas neceso, kaj homoj ne plu povas distingi inter alkoholo kiel "gusto" kaj alkoholo kiel ebriilo" aŭ "statuso" (la lasta kutime ne akceptatas entute). Tiu ĉi mikso kontribuas al la ofta kredo ke la ebriiga efekto necesas por amuzi sin. Sed tiu efekto efikas konkrete; dumaniere. Fizike ĝi malgrandigas la inhibiciojn kaj povas plifaciligi la sociumadon, oni akiras pli bonan humoron kaj "riskas" pli. Sed ĉi tio havas ankaŭ imagitan parton; ĝi iĝos memplenumita profetaĵo; oni riskas pli ĉar oni kredas ke la alkoholo donas al si tiun efekton. Kaj komprenble estas bone ke homoj povas ĝoje amuziĝi sen inhibicioj, ĉu ne? Vere, sed la kapablo krei etoson, per sia hegemonia pozicio kaj statuso, iĝas la sola ebleco, pro manko de aliaj eblecoj. Pro tio homoj



- poezio?
- mallongaj rakontoj
- lirikoj
- inspirigaj retorikaĵoj...

"Ni sidas ĉe niaj tabloj en naŭ-ĝis-kvaraj laboroj, produktantaj kion ajn niaj ĉefoj volas ke ni produktu – ni sidas en la komputilarejo de la universitato, al kie oni sendis nin por lerni, lerni la normojn de socio, lerni analizi ĝin sed nur en modoj kiuj estas akcepteblaj por tiuj kiuj kontrolas. Analizi la sistemon ene de la sistemo uzante la sistemon kiel ilo, neniam tra-irante ĝin, neniam kuraĝante rigardi preter – ĉar eble viaj okuloj estas jam vinditaj. Ni sidas hejme rigardantaj televidaj situaci-komediaĵoj, zorgante pri beboj, laboregante por provizi, sed "senlaboraj". Ni estas studentoj, ni estas pensiuloj, ni estas punkuloj en iu okupigita domo. Ni ĉirkaŭiras la stratojn de iu sennoma urbo, marĝenigitaj kaj ekspluatitaj pensantaj ke la vivo promesis al ni pli."



Nur kelkaj aferoj kiujn mi rapide notis, mi kelkfoje refoje startis, ne scias kio el ĝi mi povas uzi, kaj kio ne. Rigardetu.

Mi skribis en la angla [tradukus por la revuo – posta komento], ĉar ni bezonos fari ian specan "informilon" distribui kaj en la angla kaj en Esperanto. Kaj iel, cerbumi en la angla iom pli facilas.

Ankaŭ ni bezonas ion pri Esperanto:

"Ni skribas en E-o ĉar ni volas distribui la ideojn al plej granda nombro de homoj. Tiuj el niaj amikoj kiuj scipovas legi la anglan havas alireblon al amaso de informo per libroj, la interreto, ktp – tiuj kiuj ne scipovas estas malpli fortunaj. Ni ŝategus fari diversajn lingvajn version – kiel rusajn, ĉinajn, hispanajn, sed tiu ĉi estas unua paŝo. Vi estas ĉiuj kuraĝigitaj uzi nian materialon kiel vi pensas plej oportune – tradukante ĝin al via lingvo kaj reeldonante ĝin, espereble kun pli da materialo de vi kaj viaj amikoj (kaj nepre sendu al ni kopion! ;)) Ankaŭ, farante tion ĉi ni certamaniere devas reinventi nin mem – eble la malnovaj anglaj sloganoj ne funkcias rekte tradukite, do ni devas inventi novajn! Se Zamenhof ne donis al ni sufiĉe da vortoj por diskuti eblajn futurojn, do ni kreu ilin! E-o estas belega ekzemplo de DIY (faru vi mem) projekto – ni faru nian propran lingvon... kaj uzante ĝin, ni kompreneble daŭrigas tiun kreeman proceson."

Blah blah.

Rigardetu kaj diru se estos uzeble iel.

Stian, via kamarado armata ;)

# L'INTIFADO

Foad / Irano/Svedio (verdeolive@hotmail.com)

**Koloniismo kaj apartismo**

Kion pensas ni homoj nuntempe kiam ni aŭdas la vortojn koloniismo aŭ apartismo? Ĉu oni eĉ uzas la terminojn, krom en historiaj kuntekstoj kiam temas pri la blankula konkero de aliaj kontinentoj dum la 1500-jaroj aŭ la rasisma diskriminacio de la nigruloj en Sud-Afriko?

Kelkaj neeviteblaj demandoj ekelstaras: Kial ne plu uzatas tiuj ĉi terminoj? Ĉu ĉar ili apartenas al pasinta epoko kaj ne plu priskribas la sociopolitikan situacion de iu lando? Aŭ ĉu ĉar ni kredas ke tiuj ĉi regmanieroj ne plu plenumas funkcion en nia demokratiigita mondo, kaj do simple ĉesis ekzisti? Multas la nerespondital demandoj kaj estis la t.n. "problemo de Palestino" kiu instigis min pensi pri ĝuste tiuj ĉi demandoj.



**Fari ion aktivan**

Dumlonge inundite de la raportoj amaskomunikilaj pri la bonkonata kaj longedaŭra Israel-Palestina konflikto kaj ties viktimoj, mi ne plu eltenis vidi palestinanon post palestinano perei pro la israela okupacio kaj decidis ne plu pasivi senzorge. Fine de la antaŭa jaro, amasiginte sufiĉe da kuraĝo kaj konvinko mi finfine faris la lastan paŝon kaj iris al Palestino kiel pacaktivisto. Parte por vidi kiel vere statas la aferoj, kaj parte por iel kontribui al la longe prirevata paco.

> **"Fine de la antaŭa jaro, amasiginte sufiĉe da kuraĝo kaj konvinko mi finfine faris la lastan paŝon kaj iris al Palestino kiel pacaktivisto. Parte por vidi kiel vere statas la aferoj, kaj parte por iel kontribui al la longe prirevata paco."**

Dum mia vojaĝo al Palestino la supremenciitaj ne tute facilaj demandoj iom pli alproksimiĝis. Mi ne povas pretendi ke ĉiuj miaj demandoj respondiĝis, sed kiel internacia pacaktivisto mi vidis la realon proprokule, t.e. per tute aliaj okuloj ol la establitaj amaskomunikiloj kiuj konscie misprezentas la faktojn favore al certaj partoj. Per tute aliaj okuloj ol la israela armeo, kiu dum 55 jaroj koloniis partojn de Palestino kaj poste okupaciis la reston de la lando kaj la popolo. Kaj laste ankaŭ per tute aliaj okuloj ol la palestinanoj kiuj dum 36 jaroj vivis sub tiu ĉi neeltenebla okupacio. Mi estis eksterstarulo el Svedio kies sola antaŭa kontakto kun tiuj ĉi kondiĉoj estis per la historiaj lernolibroj, kaj eĉ tiam mi ne povis imagi kiel estus vivi sub tiaj kondiĉoj. Estis tiaokule ke mi observis la t.n. "Proksim-Orientan konflikton".

Post la cionista deklaro de la ŝtato Israelo en Palestino 1948 kaj la dehejma forpelo de 800 000 palestinanoj ekestis konflikto tra tiuj ĉi regionaj partoj. Konflikto inter milite supera okupacipotenco kaj okupita popolo, mallonge dirite inter subpremanto kaj subpremato.

**Kie?**

La areoj kiujn ni hodiaŭ nomas Palestino – t.e. la Okcidenta Bordo, la Gazastrio kaj Orienta Jerusalemo – estis sub israela kontrolo ekde 1967, kaj ĉiu palestina provo gajni sendependencon kaj liberecon estis aŭ subfosita aŭ sangoplene subpremita de la okupantaj fortoj. Tiu fakto konfirmiĝas ĉiutage, ekzemple kiam la ĉefoficejo de Jasser Arafat estis ĉirkaŭita de israelaj militistoj por poste esti detruita ĝis la fundo, aŭ per ĉiuj palestinaj junuloj kiuj dum sia ĉiutaga lukto kontraŭ la okupfortoj viktimiĝas perla militistaj kugloj. Jen plia pruvo de la malegala fortorilato.



Espen / Norvegio/Svedio (imf@start.no)

# SOJLAKTO


## KIAL?

Hejmefarita sojlakto estas ege malmultekosta, ĉ. dek elcentj de la kosto de bovinlakto (en Norvegio). Sojfaboj estas relative sanigaj. La proteinoj enhavas ĉiuj necesaj aminaj acidoj kaj malsame al bovinlaktaj proteinoj, ili ne eligas la kalcion de la korpo. La graso, malsame al la bovinlakto, estas vegetaĵa, do, pli saniga. Sojlakto estas pli mediprotektiga se oni komparas la grandecon de la terpeco bezonata por fari la du laktotipojn, ĉar la kulturado de bovinmanĝaĵo bezonas multe pli da spaco ol kulturado de sojfaboj. La plej grava argumento por trinki/uzi sojlakton tamen estas la bestoj. Bovinlakto signifas ke la bovinoj estas senliberigitaj kaj premitaj al ekstrema laktoproduktado. La sojfaboj ne povas suferi – elektu sojlakton!


## KIEL?

Por fari sojlakton, vi bezonas kvanto da sojfaboj ĉ. dekono de la dezirita laktokvanto. Enakvigu la fabojn, kaj lasu ilin dum la nokto. Elakvigu ilin, forverŝu la akvon, kaj dishaketu/kaĉigu ilin kun iomete de la akvo (1). Boligu la kroman akvon (entute dekoble de la fabokvanto, aŭ iom malpli). Enmetu la sojfabhakaĵo en la akvon, kaj kirlomovu dum ĉ. kvin minutoj (2). Nun vi povas filtri la lakton (3), kaj lasu ĝin malvarmiĝi. Kaj jen – via memfarita sojlakto! Se vi volas fari tofuon (speco de fromaĝo farita de sojlakto), enmetu citronsukon en la varman lakton, kaj kirlomovu. Verŝu la miksaĵon en filtro(tuko)n. Por havi pli firman tofuon, lasu ĝin tie dum kelkaj horoj. Kaj jen – via hejmefarita tofuo!


1)



2)



3)



### RIISMO - legohelpo

*La sekvaj kelkaj artikoloj enhavas kelkajn vortojn eble nekonatajn por multaj el vi - temas pri speco de Esperanto nomita riismo. La celo estas igi Esperanto pli seksoneŭtra kaj fleksibla, per la enkonduko de nova pronomo "ri", kio povas signifi aŭ li aŭ ŝi. Samtempe ni redefinas ĉiun radikon al seksoneŭtra signifo (ekz-e patro signifas patro aŭ patrino). Por fari ĝin pli legebla al ne-riismaj legantoj, ni dumtempe tiel skribas vortojn kun fortan seksan signifon: geviro, gepatro (viro/virino, patro/patrino). Laste, la sufikso –iĉ- enkondukiĝas paralele al –in-, kaj oni do ekhavos la vortparojn (ge)patro (patro/patrino), patrino (ina), patriĉo (malina).*

*Por pli da informoj vidu ĉe http://plaza22.mbn.or.jp/~gthmhk/riismo2.html.*

# APARATO POR FEKAĴ-GAS-UTILIGO

**Du problemoj:**

**1:** Ni ĉiuj devas feki. En multaj lokoj de la mondo nia fekaĵo kreas problemojn. En la kamparo la fekaĵo ofte simple eniras riverojn aŭ amasiĝas en tera truo, en urboj espereble eniras akvopurigantajn sistemojn, sed plej ofte tiuj sistemoj ankaŭ havas gravajn malavantaĝojn, kiel uzo de dolĉakvo.

**2:** Preskaŭ ĉiuj pli preferas manĝi kuiritan manĝaĵon ol krudan. Tio estas energie tre multekosta, kaj ofte la energio estas farita en manieroj kiuj detruas la teron. Kelkfoje en nukleaj procesoj kies kromaĵo estas ege venena plutonio, nur taŭgaj por inkubaj armeoj. Alifoje riveroj estas ŝtopitaj por produkti akvoenergion, aŭ arbaroj estas trancitaj por fari lignon.


**Ebla solvo:**

Nia fekaĵo enhavas multe da metano, kio povas transformiĝi al metangaso. Tiun ĉi gason, brulantan, oni povas uzi por kuiri, sen medimalkonservigaj konsekvencoj. Fari tiun ĉi gasaparaton, kiu uzas nian fekaĵon, ne estas komplike kaj povas esti farite ie ajn en la mondo. Jen kiel ĝi funkcias:

• La fekaĵo kaj neceseja akvo eniras teran truon aŭ ujon, kovritan kun plasta tuko por ke la gaso ne eliru.

• Konservate tie, la fekaĵo fermentas kaj la metano en la fekaĵo gasiĝas, kaj kaptiĝas helpe de la tuko, kiu iĝas kvazaŭ balono.

• La gaso estas direkte konektata kun fajrilo en la kuirejo, same kiel kun propana gaso. Tie oni bruligas ĝin kaj kuiras! Simple!



## WWOOF

Punta Mona kaj multegaj aliaj lokoj kiuj laboras kun medikonserviga agrikulturo estas parto de la organizaĵo WWOOF. Estas mallongigo por ”World Wide Opportunities On Organic Farms” (E-olingve: "tutmondaj eblecoj ĉe ekologiaj bienoj"). Estas servo simila al Pasporta Servo; se oni membriĝas, oni ricevos liston de bienoj, mallongan klarigon pri kio temas kaj kontaktan informon. Tiel oni povas mem kontakti la farmulojn kaj ekscii ĉu oni estas bonvena por helpi ĉe la laboro kaj mem lerni pri agrikulturo.

**Ligoj:**
*www,woof.org*
*www.permaculture.net*
*www.permacultureinternational.org*







**Kian rolon ludu?**

Do kian rolon ludas pacaktivistoj? Povas ŝajni iom neklare kiel oni povas labori en enmilita kaj ŝirvundita lando, sed mi provos klarigi kiaj taskoj antaŭstaras nin, kaj plej grave, kiun funkcion ni plenumas. Normala tago en okupita Palestino povas esti jena:

Partopreni en manifestacioj por rompi monatlongajn elir-malpermesojn, malfermi vojbaraĵojn kiuj malplifaciligas la liberan moviĝon de palestinanoj, protekti familiojn kaj ties hejmojn de malkonstruado per la ago vivi kun ili, akompani kampar[]anojn al ties kampoj kaj tiel protekti ilin de la israelaj koloniaj ekloĝantoj, kiuj perforte postulas la fekundajn kampojn de la kamparanoj. (La israelaj ekloĝantoj en Palestino opinias ke la lando palestina estas dia donaco al la judoj, kaj ke tio pravigas iliajn krimojn kontraŭ la palestinanaro.) Plue, ni staras inter israelaj militistoj, tankoj kaj la loka loĝantaro por haltigi pliajn mortpafadojn, iras kun ambulancoj por ke ili ne estu haltataj de militistoj survoje al bezonantoj. (Multe da gravedaj virinoj devas naski apudvoje kaj malsanuloj mortas atendante helpon.)



**Paralelo kun Sud-Afriko**

Por pliklarigi la tuton, mi volas paraleligi kun apartismo en Sud-Afriko. Dum la racisma pensmaniero kiu trasorbigis la reĝimon sud-afrikan, la fifarado ne havis limojn kiam traktis kontraŭ la nigra loĝantaro. Sed trakti la ”ne-nigrulojn” same kiel la nigrulojn estis tute nediskuteble. Sammaniere la israelaj militistoj povas sen granda konsciagonio pafi po plurajn palestinanojn tage, tion ni ĉiuj povis observi dum la dua intifado. Sed same kiel la blankuloj en Sud-Afriko, la israelaj militistoj havas ankaŭ ian limon. Ili ne povas pafi kaj mortigi ”ne-palestinanojn”, ĉar ni ne estas palestinanoj sed okcidentanoj, kaj ankaŭ ĉar la okcidenta mondo estas la apogantoj kiuj helpas la apartisman reĝimon Israelan pluvivi. Tio signifas ke mortigo de okcidentanoj estus skandalo en la okuloj de la apogantoj.

La similecoj estas frapaj, kaj la rasismo nedubebla. Evidentas ke la israelaj militistoj diferencigas inter homoj kaj homoj. Tiun fakton ni kun eksterlandaj pasporto kaj aspekto povas ekspluati por subteni kaj plilarĝigi la palestinan liberigan lukton, kiu aliokaze ekskludus la nearmitajn grupojn.



Ni kontentigas eĉ pli gravan bezonon: per nia ĉeesto ni kuraĝigas la palestinanojn en ties neeltenebla ĉiutaga vivo. Per kunlaboro kaj subteno al la palestinanoj ni montras ke malgraŭ la silento de la mondaj registaroj dum multaj jaroj, tio ne signifas la finon de la interpopola solidareco.

Jen ankoraŭ pli da similaĵoj inter Sud-Afriko kaj Palestino. Ankaŭ la apartisma reĝimo ne estis kondamnita de multaj registaroj, ANC klasiĝis kiel terorisma organizo kaj Nelson Mandela kiel senkompata teroristo. Sammaniere la israela armeo legitimas siajn murdatencojn kontraŭ palestinanoj. Kiam ili komprenos ke ni ne kredas ke ĉiuj mortigitoj en la armeaj atakoj – kiel tiu en Jenin kaj Nablus – estas teroristoj aŭ ”altaj estraranoj de Hamas”?

**Esti objektiva?**

Parolatis pri ”ambaŭ flankoj” kaj ”la partoj en la konflikto” sen substreko de la israela unuflanka ŝtatperforto kontraŭ popolo. Egaligi dekjarulon kaj ties ludkamaradojn kiuj ĵetas ŝtonojn kontraŭ tanko, kiu per sia nura ĉeesto timigas ĉiujn sur la strato kie ludas la infanoj, kun soldato kiu sidas ene de tiu kvin-tuna mortigmaŝino, ne estas objektive, estas freneze.

Tiuj du individuoj estas en tutmalsamaj situacioj, unu estas infano, la alia estas parto de la kvara plej granda milita potenco en la mondo, kaj eĉ okupacia forto. Unu sidas en multmiliona investado de mortigado kaj subpremo, la alia uzas stratŝtonojn armile. Unu trejniĝis mortigi kaj kripligi, la alia eĉ ne rajtas frekventi lernejon por lerni skribi kaj legi, pro la elir-malpermeso kaj voj-baraĵoj. Unu estas okupanto el alia lando, kaj alia estas okupato kiu rezistas la okupacion de lia lando.

La liston oni povus plilongigi. Sed la enhavo restas la sama – ni ne rajtas fari la eraron egaligi israelojn kaj palestinanojn, kaj indiferenti,; male ni devas provi kompreni la konflikton kaj ties subajn kaŭzojn. La konflikto ne estas religia, eĉ se kelkaj asertus ke judoj kaj islamanoj interbatalis jam ekde la praaj tempoj, sed fundamente ĝi estas politika konflikto.

Ĉiuj kiuj ne enkalkulas ĉi tiujn faktorojn en la provo analizi la konflikton faras ĝuste la eraron egaligi viktimon kaj farinton.

**Por libera Palestino!**
**L'intifado montras la vojon!**

# Ni rajtas esti pli ol 2

*Tomio / Svedio (solros6@spray.se)*

Laŭ mi amo certe estas la celo de l' vivo. Sed kio estas amo? Kian ideon ni havas pri ĝi?
Mi elkreskis en kernfamilio (patrino kaj patriĉo) kun romantikaj filmoj televidaj. Ĉie montriĝis ke amo estas inter knabino kaj knabiĉo. Unu + unu = amo. Poste mi komprenis ke aliaj tipoj de amo ankaŭ ekzistas. Mi renkontis miajn amikojn Annika, Magnus kaj Linn por intervjui ilin pri ilia koncepto de amo.

**Mi: Vi nomiĝas vin pluropamistoj. Kio estas pluropamismo?**
L: Pluropamismo signifas ami pli ol unu persono samtempe.
A: Aŭ almenaŭ la ebleco ami pli ol unu.
M: Prave, ni ne anstataŭigu unu regulon per alia!

**Mi: Sed se vi amas du anstataŭ unu, ĉu vi ne amas duonmulte kompare al unuopamistoj?**
M: Pli ĝustus diri ke ni amas duoble! Ne, sed rakontu al mi kiel oni povu mezuri amon?


**Mi: Ĉu mi komprenis ĝuste: vi opinias ke unopamismo estas kateniĝo?**
M: Ĉu mi rajtas juĝi? Se iu ŝatas esti du, ne estas problemo ...
L: La problemo estas ke ni nepre devas esti du!
M: Antaŭe mi devis pretigi min mem ke miaj amsentoj estis falsaj, ĉar mi sentis amon por pli ol unu persono.
L: Ni lernis ke vera amo estas ami nur unu, kaj ami plurajn estas malfideleco. Sed mi opinias ke trompi iun estas malfideleco. Se mi estus unuopamisto mi devigatus trompi mian partneron ... kaj min mem!

**Mi: Do, la avantaĝo de pluropamismo estas ke oni liberiĝas de kaptigantaj reguloj?**
M: Jes, la bazo de amrilatoj ne povas esti malpermesoj.
A: Krome, pluropamo liberigis min de la ideo ke mi devas trovi la perfektan partneron, kaj ke mi mem devas esti senmakula. La piedestalo de amo, la perfekta amrilato, ekzistas nur en libroj kaj filmoj, sed tamen hontigas nin pri la fakto ke ni estas netaŭgaj. Mi ne povas esti ĉio por ĉiu!
L: Pluropamismo minacas la ampiedestalon, revo je kiu multaj volas kredi, kaj koleriĝas kelkajn.

**Mi: Ĉu aliuloj opinias ke pluropamismo ruinigas la romantikon?**
L: Sed estas male. Mi ne volas oferi amon pro iu rilato.
M: Foje iu persono povas esti ĉio por mi, tiutempe kaj tiuloke, sed tio ne signifas ke ri ĉiam estos mia.
A: Eble ili opinias ke romantiko estas interseksa teatro kies celo estas posedi la amon de iu alia. Por mi pluropamismo rilatas kun ekvivalismo (tipo de feminismo), kies anoj preferas percepti sin kiel personoj, ne seksoj.
L: Foje bonas difini rilaton, kaj fari interkonsenton. Sed sendube pluropamo korodas la rolojn seksajn kaj aliajn. Malofte amrilatoj estas "ĉio" aŭ "nenio", pliofte estas "inter" kaj "ŝanĝiĝantaj".
M: Kiam okazas ke mi interesiĝas pri iu, gravas informi rin pri miaj amideoj. Mi ne volas kaŭzi falsajn supozojn.

**Mi: Ĉu vi ne ĵaluziĝas?**
L: Antaŭe jes, sed nun ne. Ĵaluzo temas plimulte pri malkuraĝo ol fidi siajn proprajn valorojn.
A: Kiam oni lernas ami sen posedi, pli da amo naskiĝos!

**Mi: Ĉu multaj estas pluropamismoj?**
M: Difini sin pluropamisto estas ege neordinara, sed tiuj kiuj praktike vivas kiel pluropamistoj verŝajne plimultas.





# Permakulturo, kio estas?

La vorto estas miksaĵo de du vortoj: permanenta kaj kulturo, aŭ agrikulturo. Oni povas diri ke permakulturo estas la ebleco havi fizikajn sistemojn en nia ĉirkaŭaĵo kiuj povas ŝanĝi laŭ homaj voloj, sed ne nepre ŝanĝas ĉar ili malrapide detruas la teron. Tial la principo ĉiam sekvata estas prilabori la teron sen kemiaĵoj. Oni ankaŭ klopodas estis memzorga kaj subtenebla. Oni celas krei tutan sistemon kompletan kaj tute ekologian, de akvouzado, kulturado de legomoj ktp, kiu plenumas ĉies bezonon (laueble plej multe); tiu de la la homoj, la bestoj kaj la plantoj.

Ĉio, kion la tero bezonas ekzistas en naturaj elementoj. Se ekzemple mankas nitrogeno, ofta okazaĵo se oni kulturas maizon aŭ tritikon dum longa tempo en la sama loko, oni povas aldoni tion kulturante legumenacojn, kiuj povas ekstrakti nitrogenon de la aero. Tio estas kvalito de legumenacoj, kiel ekzemple lentoj, faboj kaj ternuksoj.

Oni kulturas pensante pri kio bezonas la teron, samtempe oni ja volas uzi ĝin efektive. Tial oni ofte kunkulturas diversaj plantoj kiuj uzas malsamajn elementojn de la tero kaj malsammulte da spaco. Ekzemplo de plantoj kiuj bone kulturiĝas kune estas melopepo (malalta), maizo (alta) kaj grimpantaj faboj, kiuj uzas la maizon por suprengrimpi.

Alia manero ekspliki permakulturon estas per demando: Kiel ni povas atingi niajn celojn uzante malpli da energio? Tio estas ĉies deziro, sed ne ĉiu bone pripensas organizi la vivon respondante la demandon. Agrikulture, ekzemple, oni volas kulturi proksime al la loĝejo tion, kion oni uzas ĉiutage, kaj malproksime oni povas kulturi legumojn aŭ fruktojn kiujn oni rikoltas nur unu-aŭ dufoje jare. En la energiaj pripensoj oni devus ankaŭ inkluzivi la energion uzatan por transportoj kaj farante kemiaĵojn, ne nur la energion de la propra cerbo kaj korpo. Tiel pensante, permakulturo estas la plej efektiva agrikulturo kio ekzistas en la mondo.





# Puntamona

Astrido / Svedio/Kostariko (astridoi@home.se)

Punta Mona (Simia Punto) estas loko sur la karibia marbordo de Kostariko proksime al Panamao. Estas sufiĉe for de urboj kaj la pejzaĝo estas belega; ne detruita kiel en multaj aliaj landaj lokoj. La sablo blankas, la maro travide verdbluas, la arbaro verdverdas kaj la tero nigras...

Meze de tio nekredeblaĵo kreskas komunumo de kostarikanoj kaj eksterlandanoj. Eĉ se Kostariko, kiel aliaj tropikaj landoj, havas bonegajn eblecojn kulturi manĝaĵon sen kemiaĵoj, estas tre malofte farita. La prezo de la industriala manĝaĵo malaltas, kaj malfacilus vendi je la samajn prezojn kulturante medikonservige. Plejofte la homoj neankaŭ interesiĝas pri pli multekostan sed pli mediprotektigan manĝaĵon.

La kamparo de Kostariko plenas je agrikulturaj kampoj, ĉefe estas tri tipoj: kafa, sukera kaj banana. Volonte kostarikanoj mem manĝas bananojn, uzas sukeron kaj trinkas nekredeblajn kvantojn da kafo, sed tamen la plejmulto de tiuj produktoj estas eksportataj al Nordameriko kaj Eŭropo. Kiel en la plejmulto de la sudaj landoj, la tero ne uzatas por plenigi la ventrojn de la lokuloj, sed por kulturi mon-donajn rikoltaĵojn. Tio estas problemo de la kapitalisma sistemo kiu ne solveblas sen ŝanĝo de la ekonomia sistemo. La homoj en la sudo ja bezonas monon por vivi, kaj la norduloj feliĉe igas ilin produkti por ni malmultekostajn manĝoproduktojn. Mia opinias ke kiel homaranoj, alia monda sistemo devas esti nia longperspektiva celo, sed necesas labori nun kaj ĉiam por plibonigi la hodiaŭan situacion de la mondanaro.

La deziro de la Punta Monaa komunumo, kaj la ekologia reto kiu formiĝis en Kostariko, estas esti ekzemplo por la kampuloj, politikistoj kaj aliaj interesatoj, montri ke eblas vivi (kaj eĉ tre bone vivi) alimaniere. La nuna situacio devigasplejmulte el la kampuloj labori en la kampoj de grandaj internaciaj kompanioj, kies interesoj tute ne estas plibonigi la situacion por la kostarikanoj. La viroj faras pezan laboron multhore por malmulte da mono. La virinoj normale ne laboras kaj do tute dependas ekonomie de la salajro de siaj edzoj. Tio malliberigas ilin, eĉ se ili ŝatus, ili ne povus eksedziĝi. Homoj devus havi la eblecon vivi kaj ĝui la vivon. Multhora laboro kaj aliaj farendaĵoj, ĉiutage, malebligas al homoj vivi belan vivon.

En Punta Mona ni laboras farante alternativon. Ni montras kiel ni, per permakulturo, povas kulturi multe da manĝaĵo en malgranda loko, kun nur iom da laboro amuza (kaj, kompreneble, nenio laboro malamuza!). Ĉiuj kiuj interesiĝas povas kunesti, lerni, preni semojn kaj fari same en la lokoj kie ili vivas.

Ni ankaŭ laboras pensante pri kiel krei kooperativojn, organizi eblecojn por ke la homoj povu vendi la produktojn de siaj propraj manoj, sen esti ekspluatataj de kompanioj kiuj forprenas plejmulte de la mono kiun ili devus gajni.

**Konstruktiva mondlaboro plej bonas**

Ofte ne amuzas vidi la situacion en nia mondo, sed la plej malamuza afero ĉiam estas vidi mizeron sen scii kiel plibonigi ĝin. Multe da homoj ekas labori kiel "neistoj", la aro kiu ĉiam diras ne al la proponoj de la politikuloj. NE al nuklea energio, NE al militaj unioj, NE al tranĉitaj arbaroj, NE, NE, NE. Estas bonege ke la neistoj ekzistas. La politika ludo plej ofte malpuras, kaj kontraŭpovo necesas. Sed....ĉu amuzas esti neisto? Mi ankaŭ estis, sed post jaroj da ne-movadado mi decidis ke ne sufiĉis, ke mi volis uzi mian energion por fari ion konstruktivan, labori por bona mondo anstataŭ kontraŭlabori la malbonon. Tiel, farante tion, kion oni vere volas fari, la laboro iĝas multe pli bone farita, kaj ni homoj pli gajaj. Ankaŭ indas por ke pli da homoj povu vidi kiel povas esti la vivo, por starigi komprenon ke ŝanĝo indas kaj eblas.



# Kiaj elementoj ebligas sukceson al malfermaj rilatoj

de "A Bouquet of Lovers", Morning Glory Zell-Ravenheart
http://www.caw.org/articles/bouquet.html

*Post implikiĝo kiel plenkreskulo je malfermaj geedzecoj (mia nuntempa unuavica havas 16 jarojn), mi renkontis multajn ideojn kaj eksperimentis kun planoj kaj reguloj por funkciigi miajn rilatojn por ĉiuj koncernatoj. La celo de respondeca malferma rilato estas kulturi daŭrajn, longotempajn kompleksajn rilatojn kies radikoj estas profundaj reciprokaj amikecoj. Estas multe da varieco kiun diversaj homoj bezonas kaj serĉas en rilatoj, tamen jen du certegaj elementoj kiuj devas ĉeesti por ke la sistemo povu funkcii. Ni nomu ilin "vojreguloj".*

**1.** Honesteco kaj malfermeco pri la pluropama vivstilo.

Havi multajn rilatojn mensogante al viaj partneroj ŝajnigante ke ili ĉiuj estas "la ununura" estas supraĵa kaj detrua vivmaniero. Sen kompleta honesto, speciale pri seksaj aferoj, la rilato ne havas estontecon. En kelkaj malfermaj rilatoj oni konsentas ne diskuti la detalojn de satelitaj rilatoj kun unuavica partnero kaj reciproke, sed devas ankoraŭ respekti la bazan honeston kaj kunsenton ke aliaj rilatoj ekzistas kaj gravas.

**2.** Ĉiuj partneroj implikitaj je pluropaj rilatoj devas plene kaj volonte akcepti la bazan engaĝiĝon je pluropama vivstilo.

Situacio en kiu unu partnero serĉas pluropan amon kaj alia insistas je monogamio (amo al nur unu), aŭ forte pripledas ĝin, ne funkcios, ĉar estas tro da baza malsamopinio por ke la rilato povu funkcii.

**"Mi opinias ke la tuta pluropama vivstilo estas je la avangardo de la 21a jarcento."**

Post tiu paŝo, ni bezonas kelkajn regulojn aŭ gvidliniojn por konduko de la rilatoj.

**1.** Neniam enmetu energion en duavicajn rilatojn kiam ekzistas aktiva konflikto en la unuavica. Tiu ĉi devas esti fortega regulo, se la unuavica rilato baldaŭ aŭ poste ne disfalu. Tiu ĉi postulas ke ambaŭ partneroj estu honestaj kaj ne fiuzu la rajton de vetoo.

**2.** Teritoria ĵaluzo ne havas spacon en pluropama interkonsento, sed situacia ĵaluzo povas ekaperi kiam unu el la partneroj sentas sin neglektata. Konsultu kun la unuavica partnero antaŭ ol sekse implikiĝi longdaŭre kun duavica amanto. Same, ĉiuj novaj eblaj amantoj tuj devas esti informitaj pri ama unuavica rilato, tiel ke ili vere komprenas la unuagradecon de tiu rilato – se satelitaj amantoj fakte serĉantas monogamian rilaton, ne kontentigos ilin longtempa duavica rilato.

Mi opinias ke la tuta pluropama vivstilo estas avangardo de la 21a jarcento. Plivastiĝinta familio estos modelo pli akceptinda, tial ke la monogamia kerna familio pli kaj pli disfalos pri seriaj eksedziĝoj. Multflanke, pluropamaj plivastiĝintaj rilatoj similas al la malnova mult-generacia familio antaŭ la industria revolucio, sed estas pli bona ĉar la ligoj estas volontaj kaj, necese, bazitaj je honesto, justo, amikeco kaj reciprokaj interesoj.

kiel estus, vi volas scii
mi kaj ŝi, aŭ vi kaj mi
vi ambaŭ sidas tie, kun via longa
harar' flosanta
okuloj vivaj, via mens' daŭre
kreskanta
dirante al mi: kion faru ni nune
kiam ni ambaŭ amas vin kune?
mi amas ankaŭ vin, komprenas mi ne
kial ni ne povas daŭri trie



*"Triad" by David Crosby, traduko far Stian*

# Culture Jamming estas pli ol

## spoof-ads/anti-reklamo

**"La mensa mediprotekta movado komencis, laŭ mi, antaŭ du jaroj dum la bataloj de Seattle. Tie mi demandis al juna viro kial li protestas. ”Ĉar mi devas”, li respondis. ”Se mi ne farus mi ne eltenus. Mi ne estas aparte feliĉa persono. Antaŭe mi pensis ke kulpas mia personeco, sed nun mi ekkomprenis ke temas pri kultura problemo. Mi sentas ke dum mia tuta vivo mi estis psike misuzata – tutsimple, kaj jen venas la venĝo.”**

***Kalle Lasn, Adbusters Magazine***

*Tage / Norvegio (tage@adbusters.no)*

Anti-reklamo aŭ tiel nomataj ”*subvertisements*” ricevis grandan atenton dum lastaj jaroj kaj elmetiĝis en plej bona dissendotempo en CNN kaj estis metata sur luitajn billboards. Absolut Vodka iĝis Absolut Impotence kun foto pri trapikita, senaera botelo. Reklamilo de Calvin Klein por ”Reality” montras haroplenan kaj diketan viron. Aŭ kion vi diras pri reklamilo por ”Smirnoff” kiu anstataŭ la glamurajn reklamaĵojn de Smirnoff montras batitan infanon? Jen ekzemploj de profesie faritaj anti-reklamaĵoj kiuj unuavide povas pasi kiel veraĵoj. Estis ja iom da kritiko kontraŭ organizaĵoj kiaj Adbusters (*www.adbusters.org*) ke ilia anti-reklamado estas tro realisma kaj tial nur malmulton alian faras ol generi atenton pri la marko-varo kaj ke ĝi estas tro surfaca por esti danĝera. Kalle Lasn, unu el la fondintoj de Adbusters, tamen obstine mantenas ke ilia strategio estas la plej efikiva por veki homojn el ilia ”dormo de konsumantoj” kaj igi ilin engaĝi sin kontraŭ maletikaj reklamado kaj laborkondiĉoj. En la maldekstrularo la debato ĉu la strategio kopii la dezajnprofilon de maletikaj firmaoj por meti ilin en malfavoran lumon tute superombris aliajn aspektojn de culture jamming. Kaj tio estas domaĝo, ĉar *culture jamming* estas multe pli ol profesie farita satiro pri la maletika praktiko de diversaj multnaciaj firmaoj.

**”Culture jamming, aŭ kultura agismo estas aktivismo kiu prenas kiel deirpunkton la ĉiutagan vivon de homoj kaj kiu komunikas per renverso de ĉio kutima.”**


### *Culture Jamming*

*Culture jamming*, aŭ kultura agismo estas aktivismo kiu prenas kiel deirpunkton la ĉiutagan vivon de homoj kaj kiu komunikas per renverso de ĉio kutima. Kiel kiam iu volis protesti kontraŭ nia ekonomia sistemo kaj disĵetis monerojn interne de borso tiel ke distriĝis la akcimakleristoj kaj falis la borso. Kiel kiam iuj presis falsajn senpagajn biletojn al kinej-premiero proteste kontraŭ altegaj biletprezoj. Kiel ke enneceseja reklamo en lernejoj de Usono instigis junulojn havigi al si la malŝlosilojn de la reklamfaraj firmaoj kaj tiel distribui memproduktitajn murĵurnalojn. Ĉio tio estas bonaj ekzemploj ke culture jamming ne nepre limigu sin al *glossy* anti-reklamaĵoj en plej bona dissendotempo.

La koncepton *”culture jamming”* unue uzis la artista kolektivo Negativland kiel priskribo de ilia subfosa agado, ekzemple politikaj instalaĵoj sur *billboards* kaj diversaj formoj de amaskomunika sabotado (*www.negativland.com*). En ilia vidbendo ”Jamcon ‘84” unu el la grupmembroj tiel ĉi elmetas la aferon:

*”Dum kiam kreskas la konscieco pri kiel la amasmedia pejzagxo en kiu ni vivas afekcias kaj direktas nian internan vivon, kelkaj rezistas... La arte refarita afisxego... direktas la publikan rigardanton al konsidero de la origina firmaa strategio. La studio de culture jammer estas la mondo granda.”*

La menciita kanada revuo Adbusters estiĝis kiel reago kontraŭ tio ke la amaskomunikiloj ne donis spacon al agaduloj rilate kun agado kontraŭ forhako de arbaroj en la malfruaj 80aj. La revuo penas dokumenti *culture jamming* kaj ligi agismon al kontribuoj de teoriuloj kiaj Neil Postman kaj la anarkiisma filozofo John Zerzan. Alia grupo kiu gravis por igi *culture jamming* konata estas *Billboard Liberation Front*. De la 70aj ili manipulas reklamafiŝojn de interne, tiuj ĉi homoj nome laboras en la reklambranĉo. Oni povas kritike diri ke tio ĉi estas speco de indulgenc-






la alta teknologio (interreto) kaj la tradiciaj teknologioj de amas-komunikado (ĉefe radio kaj televido). La celo estas interligi la teknikajn eblecojn de interreto kun disvastigo de informoj per tradiciaj metodoj. Tiel, ekzemple, la son-arkivoj estas konservitaj en la hejm-paĝo kiuj poste estos disaŭdigitaj fare de la liberaj kaj komunumaj radioj; kelkaj kolektivoj de la reto SCA-Brazilo ankaú ellaboras inform-raportojn kiuj estas sendataj al radioj.

**S: Kiam komencis SCA en Esperanto? Kial?**

J: En la jaro 2001 kiam mi komencis agadi ĉe SCA, mi eksciis pere de nia nacia diskut-listo (en la portugala) ke estis lingva problemo en la tutmonda SCA, ĉar multaj aktivuloj plendis pri la uzo de la angla por komunikado inter la tutmonde disvastigataj SCA-anoj. Mi sciis ke en la internacia diskut-listo de SCA (en la angla) estis lanĉita propono ke Esperanto estu la lingvo de SCA tutmonde. Kompreneble ne estis interkonsento pri la propono. En la mezo de 2001 estis intereta kunsido de aktivuloj de SCA-Brazilo kaj mi proponis ke ni almenaŭ traduku la tekstojn de la hejm-paĝo ankaŭ al Esperanto, tiamaniere ke Esperanto estos unu el la lingvoj uzataj apud la portugala, hispana kaj angla.

En la komenco de aŭgusto de la jaro 2001 kreiĝis la traduk-listo de originalaj tekstoj al Esperanto ĉe *http://lists.indymedia.org/mailman/listinfo/www-esperanto*. Ĝenerale ni nur tradukas la tekstojn el la portugala lingvo (tekstoj eldonataj de SCA) de la centro de la ĉefa hejm-paĝo, sed estas esperoj ke iam la Esperanta hejm-paĝo de SCA havu plenan aŭtonomecon publikigi kaj eldoni tekstojn.

**S: Kiun rolon vi opinias ke Esperanto povas ludi en la radikala movado?**

J: En la tria mondo la homamasoj (malriĉaj kaj de la meza klaso) ne parolas la anglan lingvon ĉar la publika lernejo estas fuŝa. Multaj ”instruistoj” de la angla tie ĉi ne scipovas la lingvon. Nur la riĉuloj povas pagi bonan lernejon por lerni la anglan. Esperanto estas pli facila ol la angla kaj havas avantaĝon ke ĝi ne estas ligita al la usona imperiismo. La radikala movado ankoraŭ ne solvis la lingvan problemon. Vera revolucio okazos en la mondo kiam ni ”kontraŭu la tutmondiĝo de la kapitalo kaj antaŭenigu internacian solidarecon, ni tutmondigu nian ribelemon kaj lukton per Esperanto, lingvo sen-nacia”.

**S: Ĉu estas iuj problenoj pri la uzo? Kiel reagas aliulojn?**

J: En la komenco SCA-anoj ne komprenis kaj antaŭjuĝis Esperanton. Mi argumentas: se vi ne volas legi tekstojn en Esperanto en la hejm-paĝo de SCA, vi ne legu. La hejm-paĝo havas versiojn en 4 lingvoj: vi elektu la lingvon kiu plej plaĉas al vi. Ni, esperantistoj-volontuloj de SCA fieras ke post la portugala versio, la Esperanta versio estas la plej aktualigata versio. En la tria rango estas la angla versio kaj en la hispana lingvo estas tre malmultaj tekstoj. La SCA-aktivuloj jam ne plu demandas pri la uzo aŭ ne de esperanto en la hejm-paĝo. La esperanta versio jam estas rigardata kiel parto de la hejm-paĝo. La komercaj kaj burĝaj amas-komunikiloj kelkfoje informas pri la ekzisto de SCA kaj informas ke la paĝo estas disponebla en kvar lingvoj, inkluzive en esperanto (jen nerekta disvastigo pri la praktika uzo de nia lingvo).

**S: Diru ion pri la politikaj radikalaj movadoj en Brazilo? Ni ĉiuj aŭdis pri Porto Alegre, kaj la urbo, kaj la WSF... kion pensas pri tio brazilanoj? Kaj kio pri Lula?**

J: Mi kiel maldekstra anarkiisto jam delonge ne voĉ-donas kaj pensas ke ne estas solvo por la homaro dum kiam ekzistas ŝtatoj kaj kapitalismo. Pri la nova registaro de prezidanto Luiz Inácio Lula da Silva (Lula) li estas komplica de la internacia ekonomia ordo kapitalisma kaj el ĝia regado ni ne povos atendi reformojn al socialismo aŭ eĉ mildigon de kapitalismo. Lula esta lakeo de IMFm Usono kaj de la monda elito. Li kaj lia partio (laborista partio) perfidis la laboristan klason.

Pri la Monda Socia Forumo kiu okazis en Porto Alegre, ni anarkiistoj bojkotis aŭ partoprenis ĝin hezite, ĉar ĝi estis Forumo vertikale strukturita, ne plene demokratia, kontrolita de la sama PT (laborista partio) de Lula (la urbo-domo de Porto Alegre estas regata de PT). En la Forumo de la jaro 2002 okazis ”ribelema marŝo” paralele al la oficiala marŝo. Dum la oficiala forumo okazis paralelaj eventoj de vere radikalaj aktivuloj kiuj ne plu volas kapitalismon. La Monda Socia Forumo estas pli kaj pli ia turisma evento por aktivuloj, amuza, sed nur amuza. El ĝi ne venos veraj efektivaj proponaj ŝanĝoj.

*(La intervjuo kondukiĝis E-lingve per retpoŝto en majo 2003, dankon al Joao!)*

cmi brasil
centro de mídia independente
www.midiaindependente.org

**Date: 20.06.2003**
**From: joao (esperanto@directnet.com.br)**
**To: stian (shaklev@gmx.net)**
**Subj: Intervjuo**

**S: Unue io pri vi mem, kiu vi estas? Kie vi loĝas kaj kiom vi aĝas?**

J: Mi estas Johano (João Manoel Aguilera Junior), kaj estas 42 jaraĝa. Nuntempe krom mia aktivado per kaj por esperanto, kaj ĉe brazila sekcio de SCA (Sendependa Centro de Amas-komunikiloj), mi estas besto-protektanto kaj partoprenas al la anarkiisma movado. Mi loĝas en urbo Campinas, foras 100 km el São Paulo.

**S: Kiel vi ekinteresiĝis pri la radikala movado?**

J: Preskaú ĉiuj instruistoj pri Geografio kaj Historio estas iomete indignitaj pri la nuna situacio de la mondo en kiu ni vivas. Do, ekde mia universitata studo (jaro 1980) mi simpatiis kun anarkiismo, partoprenis strikojn en mia laboro, protestojn, bojkotojn kaj marŝojn de popolaj movadoj.

**S: Kial vi lernis Esperanton?**

J: Al mi neniam plaĉis la usona imperiismo (en kiu la altrudo de la angla lingvo estas parto). Fakte ĝis hodiaŭ mi rezignas lerni la anglan. Do, kiam mi eksciis pri la ekzisto kaj reala uzo de esperanto mi entuziasmiĝis ne nur pro tio ke mi povas komuniki kun homoj de aliaj landoj sed pro tio ke mi ne bezonas uzi la anglan. Kiam homoj demandas al mi, kial mi lernis Esperanton, mi kutime diras ke estis politika decido. Fakte kiam ni decidas lerni (aŭ ne lerni) iu ajn lingvon ni, konscie aŭ ne, faras politikan decidon.

**S: Pri la SCA - kiun rolon ludas SCA en Brazilo?**

J: SCA (Sendependa Centro de Amas-komunikiloj) ludas gravan rolon en Brazilo: ĝia ĉefa hejm-paĝo en la portugala (kie estas ligilo al Esperanta versio) estas vizitata averaĝe de ĉirkaŭ 20.000 homoj ĉiutage. Kelkfoje ni publikigas raportojn pri faktoj kelkajn tagojn antaŭ ol la komercaj (burĝaj) amas-komunikiloj.

**S: Kiam ekestis SCA en Brazilo? Kiel? Diru ion pri la nuna organizo, strukturo kiel funkcias... Kiujn planojn vi havas?**

J: Sendependa Centro de Amas-komunikiloj estas internacia reto de sendependaj produktantoj de amas-komunikiloj, kiuj zorgas pri la konstruado de socio libera, egaleca kaj kiu respektas la naturan medion.

Laŭ la hejm-paĝo de SCA: ”Sendependa Centro de Amas-komunikiloj estis kreita origine en Seattle kiel alternativa rimedo por raporti pri la eventoj kiuj okazigis la fiaskon de la ”Kunsido de la Jarmilo” de MKO (Monda Komerca Organizaĵo) novembre 1999e. La ideo estis havigi hejm-paĝon en interreto kiu povus ricevadi kaj konservi videojn, bildojn, sonojn, kaj tekstojn kiuj povus esti publikigitaj kaj reproduktitaj sen kopirajtoj de iu ajn amas-komunikiloj sen komercan profit-celon. Dum la kresko de la protestoj kontraŭ la ”tutmondiĝo” pligrandiĝis, regionaj SCA-oj estis kreitaj ĉie kie la ”novaj movadoj” aperis. Nuntempe estas pli ol 70 Sendependaj Centroj de Amas-komunikiloj en pli ol 30 landoj en ĉiuj kontinentoj. Brazila SCA naskiĝis okaze de disvolviĝo de movada organizado kontraŭ la tutmondiĝo en São Paulo kiu instigis la proteston la 26an de septembro 2000 (S26) kiam MFI (Mona Fonduso Internacia) kaj MB (Monda Banko) kunsidis en Prago. En decembro 2000, la hejm-paĝo de Sendependa Centro de Amas-komunikiloj aperis kaj ekde tiam ĝi klopodas raporti pri eventoj ligitaj al la socia lukto.

En Brazilo, SCA estas reto de kolektivoj disigitaj en diversaj urboj. Ĉiu kolektivo disvolvas lokajn projektojn kaj ili ĉiuj partoprenas je la administradon de la hejm-paĝo. SCA havas multajn projektojn. Unue estas la hejm-paĝo kiu ne celas esti projekto ekskluzive ligita al Interreto sed roli kiel ponto inter






aĉeto, sed ilia agado inspiris multajn fari la samon. Fakte oni povas iri reen al la depresia tempo de la 30aj por trovi la radikojn de tia *afis busting*. Ridetaĉaj reklamafiŝoj dum la depresio incitis multajn mizerulojn kaj estis favorata celo de politikaj manipuloj. Naomi Klein skribas iom pri tiu periodo en la ĉapitro pri *culture jamming* en sia *”No Logo”*. Unu el la plej gravaj inspirfontoj de la nunaj *culture jammers* sendube estas la situaciistoj. Tiuj ĉi estis aktivaj en la 50aj ĝis la fruaj 70aj. La grupo estis fondata de 30 avangardaj artistoj, sed finis kiel malgranda kerno de arte kaj politike seniluziigitoj. Tamen oni konsideras ilin unu el la plej gravaj inspirfontoj de la studenta insurekcio de 1968. Inspirita de dadaismo ili evoluigis sian *”détournement”* kiun oni devas konsideri subfosa konfuztekniko kaj proksima parenco de kion nuntempe oni ligas kun *culture jamming*. Ekzemplo de ilia subfosa praktiko estas meti politikajn tekstojn en parolgloboj de famaj bildstrioj kaj distribui tiujn ĉi al homoj kiuj kutime ne interesiĝas pri politikaj mesaĝoj. Ili interesiĝis pri la psika efiko kiun la strukturo de la urbo havas sur la enloĝantojn. Psikogeografio estis la nomo de ilia provo sisteme kompreni tion ĉi. Ilin okupis la ideo ke oni moviĝu en la urbo sen konkretaj celoj (ili nomis tion *dérivé*), kaj ili estis en konflikto kun ĉiuj burĝaj idealoj. Ili estis revoluciemaj sed precipe interesiĝis pri revolucio rilate al la ĉiutaga vivo de homoj kaj ne al grandiozaj politikaj ideoj kaj vizioj.



**Humuro**

Antaŭ ol mi mencios diversajn specojn kaj ekzemplojn de *culture jamming* mi unue volas de pli proksime rigardi tion kion mi konsideras centra pri la metodo. Ĉi-rilate eble plej elstaras humuro. Kiam oni faras subfosan agon, ĉu ŝanĝi billboard, ĉu sin alivesti por spontana performance, oni renversas ion kutiman, aŭ per kreo de neintencitaj interpretoj de la origina mesaĝo aŭ per faro de kontrastaj deviaciaj agoj. Humuro precipe estas bona efikilo por komuniki gravajn temojn. Se oni reiras al la mezepoko oni konstatas la rolon de la kortega bufono, kiu estis ĝuste komuniki gravajn temojn (morton kaj krizon) en humura maniero, kaj ke la bufono fakte estis unu el malmultaj kiuj estis en pozicio por rajti kritiki la reĝon. Humuro ankaŭ gravas por penetri la fortika&ojn aŭ okulŝirmilojn de homoj. Tion ĉi ekkomprenis antaŭ longe la reklamistoj, sed fundamenta diferenco inter reklamo kaj *culture jamming* estas ke la unue menciita ekstreme malofte havas la subkuŝantajn malkovrojn kaj gravecon kiujn havas *culture jamming*. Humuro ankaŭ estas grava por eviti ke la ricevonto de la mesaĝo sentos ke oni moralumas pri ŝ/li. Aldone humuro kreas surprizon kiu havas la efikon ke la subkuŝanta mesaĝo ricevas pli da atento ol se oni nur disdonus flugfoliojn. Alia centra trajto de *culture jamming* kaj de tio kion oni nomas kultura aktivismo, estas la interesiĝo pri evoluigita form-arto. Jen oni alstrebas troviĝi laŭeble plej proksime al la formo de reklamo por surprize ataki markvaron en ĝia propra batalkampo, jen oni dekomence estas artisto kaj deziras doni al formo centran lokon en sia agadisma laboro.

En sia brila eseo pri *culture jamming* Mark Dery mencias plurajn specojn de *culture jamming* (*www.markdery.com*): Spoofads estas la menciitaj provoj imiti la estetikon de reklamo sed kun subkuŝanta grava kaj kritika mesaĝo. *Mediahoaxing* estas amaskomunika kritiko tradukita en praktikon. Anstataŭ skribi leterojn de leganto pri la surfaceco de la amaskomunikiloj, oni konstruas falsajn historiojn kaj trompas ĵurnalistojn por poste malvuali ĉion kaj prezenti sian mesaĝon de amaskomunikila kritiko. Joey Skaggs, bazita en New York (*www.joeyskaggs.com*), trompas ĵurnalistojn ekde la 60aj. Li interalie ricevis aertempon en TV pro laŭdire starigi hundo-bordelon kaj pro science esplori pri ekstraktado de antipustula medikamento el mutaciulaj blatoj. Alia speco estas *cyber-jams*. Unu el la plej konataj ekzemploj de tio ĉi estas la domen-piratoj kiuj pludirektis la trafikon de la retpaĝo de Nike en Aŭstralio al informpaĝo pri infanlaboro. Alia fama ekzemplo estas la grupo ”Yes men” (theyesmen.org) kiu posedas la domenon gatt.org. Do la malnova nomo de WTO. Tra sia adreso ili ricevas invitojn kiuj reale estis intencitaj por WTO, kaj ili volonte akceptas veni al grandaj kunvenoj vestitaj






en ora smokingo kaj energie parolas pri la estontaj ebloj totale gvatadi dungitojn. Ĉio akceptata per aplaŭdo fare de nesciaj firmaĉefoj. *Street-jams* estas kolektiva nomo de agadoj en la urba spaco, jen kontraŭleĝa stratfesto, jen ŝanĝo de billboards aŭ politika performance kia ekzemple nevidebla teatro. *Space-hijackers* estas brita grupo fama pro starigi nekompreneblajn ŝildojn kaj falsajn afiŝojn telefonseksumajn, kaj pro esti okupinta metro-vagonon.

**Kial?**

Kial homoj okupiĝas pri *culture jamming*? Kvankam certe estas same multaj motivigoj fari *culture jamming* kiom estas manieroj *"jam"-i*, unu afero estas inda je mencio ĉi-rilate. Por Kalle Lasn *culture jamming* precipe estas maniero disvastigi kontraŭkulturajn *memojn (ne de E-a "mem"*, *noto de la tradukisto)*. *Memo* konsideratas socikulture egalvalora al genoj kaj apartenas al scienca kampo ankoraŭ malalte estimata en akademiaj medioj. Ĉu tio ĉi estas *kosher* en scienco aŭ ne, ĉiukaze temas pri provoj kompreni kiel kulturaj fenomenoj kaj kodoj disvastiĝas. Por Kalle Lasn *culture jamming* estas efikiva *memo*-batalilo kiu bone konkuras eĉ kun miliondolaraj reklambuĝetoj de maletikaj firmaoj. Lia plej efikiva memo-strategio estas *"uncooling"*. Unu el la celoj de *uncooling* estas atingi ke la maletika markvaro perdas sian lokon en la kapoj de homoj kiel "necesaĵo". Oni volas do malkonstrui la lokiĝon kiun la markokonstruantoj laboradis por atingi. Ekzemplo de tio estas ĉenretpoŝto de iu kiu volis gravuri *"sweatshop"* ("maletikaj laborkondiĉoj") sur siajn Nike-ŝuojn. Li ricevis rifuzon malbone bazitan de Nike, sed la retpoŝto estis sendata tra la tuta mondo kaj montris al pluraj cent miloj ke malantaŭ la *sporty* fasado de Nike troviĝas tre *mal-sporty* realo en formo de malbonaj laborkondiĉoj. Tio ĉi estas speco de aktivismo kiu nocas la markvaran kapitalon kaj kiu atingas multajn. Por traduki al aliaj vortoj, la efiko estas ke la marko perdas sian kare pagitan *cool-econ*. Sukcesi pri tio ne estas pli neebla ol estis por la markvaroj atingi siajn poziciojn en la komenco. En multaj rilatoj la konstruo de markoj tute senbridiĝis se oni konsideras la metodojn kiujn oni uzas, la celgrupojn kiujn oni elektas kaj la intensecon al kiu oni elmetas homojn. Aldone ofte kilometre diferencas la glamura reklamfasado per kiu vestas sin la firmaoj kaj la realeco de la laboristoj kiuj laboras por ili. *Uncooling* estas gverila milito kontraŭ reklamistoj kiuj provas invadi nian kapon; kontraŭ la markoj kiuj provas igi sin "necesaj" partoj de niaj vivoj per ĉiam kreskanta komercigo de la kulturo.

*Culture jamming* do estas pli ol kontraŭlabori reklamon kaj maletikajn markvarojn sekvante la premisojn de la reklamo mem. Eĉ por Kalle Lasn ĉio komencis kiam li, frustrite fare de la nepersona efikeco de la ĉenmagazenoj, *"jam"-is* la monenĵetujon de aĉetuma vagoneto en grandsurfaca butikego.

## Hindio

**(http://india.indymedia.org/)**

**Por nia trinkakvo!**

Kampanjo kontraŭ Coca-Cola kaj ilia ekspluatado de la malgranda grundakva resursoj pli kaj pligrandiĝas en Sivaganga en tamil Nadu. 28a de Aprilo, pli ol 7000 homoj, multe el kiuj virinoj, defiis malpermeson partopreni en demonstracio kontraŭ Sakthi Sukerfabriko en Pamadathur. La sukerfabriko kontraktis kun Coca Cola produkti ilian trinkaĵon uzante ĉ 75 000 litrojn da akvo ĉiutage. Estroj de la movado klarigis la implikojn de la kontrakto por la loka komunumo rigarde al la irigaciaj kaj trinkakvaj bezonoj.

independent media center

## Italio:

**(www.indymedia.it)**

**Ĉu mankas al vi domon? Stultulo! Okupigo!**

Nun estas krizo, kaj al krizoj oni respondas per krizaj kontraŭmizuroj – okupigo de domoj por doni dignon e spacon al familioj, studentoj, bezonantoj. La Agenco Komunuma por la Rajtoj jam establigis tri ejojn en Romo dum la lastaj kelkaj semajnoj. La problemo de loĝejoj estiĝis neeltenebla en Romo, tio diras ankaŭ la urba konsilo post profesia esploro kiu konkludas ke la lupagoj en Romo kreskis per 55% de 2001 al 2002.

**Strat-Televido**

ANT estas elsendilo movanta kiu tramovos kelkaj el la romaj loĝareoj, ensendante en la tagĉambrojn kaj konfuzigante la kutimojn televidajn. Ant estas unu el la multaj eksperimentoj de strat-televido kiu naskas ĉie en Italia kontraŭ la povego de "mamma rai e fratellone mediaset" (patrino Rai, la ŝata televido kaj granda frato mediaset – la televidkanalo de la itala ĉefministro Berlusconi).



*kuraciston ĵus revenintan hejmen de Usono. Mi sukcesis tuŝi ŝin. 20 tagojn pli poste oni diris al mia patrino ke ŝi prenu min hejmen. Je tiu tempo mi estis malforta, ofendita kaj malbela.*

*Post tio mi etis sendata plurfoje al hospitaloj. Mi provis mortigi min kiel agon 2 sed nesukcesis. Ago 3: Por venĝo mi malmetis mian pantalonon antaŭ mia patrino kaj kriis al ŝi: "Vi bedaŭros!" Je mia granda plezuro, mia patrino estis tiom terurita ke ŝi tuj petis kuraciston doni al mi medicinon.*



*Mi ĉiam liberigatis post mallonga tempo, ĉar mia patrino ne havis sufiĉan monon por la alta prezo de la mensa hospitalo. Mi sentis min tiom bonŝanca ke mi estas viva. Sed la sunradiado neniam revenis.*

*Feliĉe mi iris reen al la lernejo. Sed mi trovis malfacila alfronti homojn. Mi eĉ forgesis kiel rideti. Mi kaŝis min en mia loko en angulo de la klasĉambro. Konante mian pasinton, kelkaj miaj klaskamaradoj ridis al mi kaj kriis "idioto!" Iuj simple evitis min.*

*Plejparte de la tempo mi sentis min kvazaŭ eksterterulo gvatanta tiujn kiuj vivas surtere. Ili ne volis paroli kun mi, kaj mi ne volis paroli kun ili. Mi povis spiri nur en muziko, en libroj kaj en la vortoj kiujn mi skribis.*

*Mia patrino okupiĝis pri nova plano: Mi ne povis kredi ke veris – ŝi klopodis por edzinigi min al iu knabo. Ŝi petis en la policejo ŝanĝon de mia naskiĝjaro de 1985 al 1980, por ke mi povu laŭleĝe edziniĝi. Kaj la knabo konsentis zorgi pri mi kio ajn okazu! Sed ilia plano fine pro monproblemoj ne realiĝis. Dank' al Dio!*

*Poste mia patrino invitis iujn universitatajn studentojn viziti min. Kvankam ŝia intenco estis malama, mi ŝatis amikiĝi al tiuj studentoj. Mi amis iliajn gajajn ridetojn. Unu el ili donis al mi notlibron kaj petis min skribi, skribi pri miaj revoj - kio rememorigis min pri espero, tio por kio homoj vivas.*

*Tiuj gajaj ridetoj de la universitataj studentoj inspiris miajn revojn pri universitato. Mi volas retrovi mian propran rideton. Mi volas iri al la ĝardeno, eĉ se nur kiel herba folio. Mi volas eliri tra la fenestro, kvankam ili diris ke tiukaze mi malobeus la regulon kaj punatus. Tio estos mia dua vivo. …*





# Herba folio

Diedie / Ĉinio (by7flytfly@hotmail.com)



*Mia nomo estas Chen. Mi petas pardonon pro mia senorda kaj embarasa aspekto ĝuste nun. Mi estis survoje de la lernejo. Sed taksio atendis min. Mi vidis mian patrinon kun tri viroj – alivestigitaj kuracistoj de la mensa hospitalo. Mi simple sciis. Ili tiris min en la taksion. Mi baraktis kaj falis surteren, kio igis mian jakon malpura per multa koto.*

*Ili diris ke mi estas stulta. Ili diris ke mi estas antomaniulo. Kio estas "idioto"? Kio estas "antomaniulo"? Ĉu mi estas?*

*Kiam mi havis 14 jarojn, mi prenis belan pupon kaj iris al mia instruistino por diri al ŝi ke mi amas ŝin, ĉar ŝi estis tiom bela virino en miaj okuloj. Mi rakontis tion al najbara knabino. Mi ne sciis kion ŝia patrino, tiel nomata psikologo, diros al mia patrino. Mia patrino komencis plenigi min per iuj piloloj, kio igis min dormi dum plejparto de tiu vintro. Mi perdis plejparton de miaj lecionoj, perdis ĉiujn miajn amikojn kaj malsukcesis je la enira ekzameno por altlernejo.*

**Chen havas psikologiajn problemojn, sed ŝia patrino sendis ŝin al mensa hospitalo. Tio ne estas surpriza en mia lando, kie homoj emas ne vidi la limon inter psikologiaj problemoj kaj psikozo.**

*Mi sentis min tiom malgaja kaj humiligita. Mi kriis kaj ĵetis ĉion kion mi povis levi el la fenestro. Mia patrino fine prenis tion kiel signon ke mia psikozo komencis.*

*Kiam mi ĵus celebris mian 15an naskiĝdatrevenon, oni prenis min en aŭton preskaŭ pli grandan ol mia ĉambreto hejme. Mi grade komprenis kien oni prenis min, sed miaj piedoj estis tro senfortaj por fugo.*

*Ĉi tie oni havis amindan nomon por la mensa hospitalo, nome "Ses-angula Kiosko". Sed kiam vi eniris en ĝin, vi estis perdonta ĉiun vian sunradiadon kaj la aeron en kiu vi povas spiri.*

*Kiam oni klakigintis la pezajn pordojn unu post la alia, mia koro sinkis en la izolitan obskuron de malgranda ĉambro. Du virinoj jam estis kaptitaj tie. Unu manĝis akvomelonon. La sangeca suko makulis ŝian buŝon kaj ŝian vangon dum ŝi subridis por bonvenigi min. La alia fikse rigardis min per ŝiaj malplenaj okuloj kaj klukridis nur post minutoj.*

*Estis kvazaŭ ĉiutaga batalo. Ili komencis devigi min preni pilolojn – ili volis ke mi ĉesu pensi. Mi rezistis kaj provis eskapi. Sed la flegistoj kaptis mian hararon kaj premis mian vizaĝon surteren kaj igis min gluti la pilolojn. Kelkfoje ili pli ĝentile agis kaj pulvorigis la pilolojn por trompi min. Dum tiu tempo mi penis trinki tiom multe kiom eble da akvo por dilui la efikon de la medicino.*

*Mi ekkomprenis ke mi devas ion fari, ĉar se mi nenion faros, mi mortos. Mi ekhavis ideon. Ago n-ro 1: Mi skribis amleteron al la prezidanto de la mensa hospitalo kaj esperis ke li estos tuŝata kaj ke li liberigos min. Sed li prenis min kiel mense perturbita naiva juna admirantino. Oni prenis min reen al la malsanula ĉambro. Mi estis bone kaptita.*

*Oni liberigis min ne antaŭ ol kiam mi renkontis virinan*



# Amo kaj sekseco

Espen / Norvegio/Svedio (imf@start.no)
Bildoj de Magda / Svedio (blubbfisk@hotbrev.com)

**Kio estas amo? Ĉu amo kaj sekseco estas tute biologi-bazitaj, kaj jam-difinitaj, aŭ ĉu estas pligranda spaco por nia ludemo kaj kuriozo? Ĉu ni rajtas ami nur unu, kaj ĉiu rilato nepre estu bazita je reciproke multa amo? Jen nur kelkaj el la demandoj kiuj Espen starigas en tiu ĉi artikolo.**

**Enkonduko**

Kio estas amo? Ĉu ĝi estas komunhoma kaj eterna, kodita en niaj genoj ekde l' ekesto? Aŭ ĉu amo estas produkto de kulturo, ŝanĝiĝante de land' al lando? Kaj sekseco, kutime konsiderata kiel fizika esprimo de amo, ĉu baziĝas en niaj korpoj kaj genoj, aŭ ĉu la kulturo en kiu ni elkreskas kontrolas kaj formas la ideojn pri kiu altiras nin, kaj kiel? Ĉu amo kaj sekseco estas du partoj de unuo, proksime ligitaj, aŭ ĉu ege malsamaj, sendependaj fenomenoj? Mi asertas ke la percepto pri amo kaj sekseco kiel biologiaj, relative konstantaj unuoj devas esti rigardata antaŭ ĉio kiel mito. Sed tio ne signifas ke mi entute akceptas la malsamon, mia aserto do estas ke kaj amo kaj sekseco havas biologian fundamenton, sur kiu baziĝas relative ampleksaj, kulture kondiĉitaj romantikaj kaj erotikaj pensoj kaj sentoj. Laŭ mi, tio povas esti la deirpunkto por novaj pensmanieroj kaj ideoj pri kaj amo kaj sekseco, kiuj ebligos konscian kaj aktivan rilaton al ĉi tiuj sentoj, kaj la plivastigadon de la seksumada kaj romantika repertuaro.

**"Vere ami iun post-ulas riski perdi rin"**



**Sekseco kaj unuopamo, ĉu biologi-bazitaj?**

En teoria diskuto pri biologio kaj deziro verŝajne pli facilas komenci kun la koncepto sekseco. Kio vere estas, tio kio altiras nin sekse? Kiel povas iĉemulo scii ke ri estu altirata de viriĉoj? Kelkaj diras ke estas lernite; ke viriĉoj altiras virinojn, kaj male. Tio tamen ne multe helpas komprenigi la faktan staton ke la ekzisto de samseksemeco, ĉu en socioj kie kondamnatas, ĉu en socioj kie estas akceptata, estas sufiĉe nevarianta. Laŭ mi verŝajnas ke seksa altiro rilatas al biologio, sed neniu scias kiel aspektas la ligo. Misteras kiel genoj, hormonoj aŭ io alia povas informigi la cerbon pri kiel aspektas "iĉo" kaj "ino", sed eble ne tro gravas. Tamen ne nur estas seksorganoj, korpformo kaj vizaĝotrajtoj kiuj decidas pri kio altiras nin - vestaĵoj, vizaĝopentraĵo, korplingvo, hararo kaj simile akiras altireblon per siaj ligoj al biologia sekso, kaj tiel ni lernas, almenaŭ iagrade, kio estas sekse alloga.

La stabila troviĝo de samseksemo, kaj la fakto ke preskaŭ neniu ekaltiratas de alia sekso ol tiu, kiun oni unue preferis, indikas ke sekse bazita altiro estas profunde biologia (sen diri ke oni ne rajtas eksperimenti!). Ĉu la institucio de la unuopamo estas same biologie bazita? Ne nur la kreskanta fenomeno de senzorgaj hazardaj seksrilatoj, sed ankaŭ la fakto ke la monogama institucio almenaŭ parte povas esti atribuita al pasintaj politikaj ideologioj kiuj zorgis pri transakcio de posedaĵo trans la generacioj; iĉoj (ĉar estis iĉa socio) devis scii kiuj estos iliaj heredontoj – iliaj infanoj. Eĉ se la unuopama institucio suferis grandan regreson en multaj landoj kaj kulturoj en la praktiko, morale ĝi ankoraŭ tamen havas la superecon. Oni prefere koitu kun tiu, kiun oni amas, eventuale la geedzo, kaj nur ri - oni certe ne havu plurajn seksumajn rilatojn samtempe.

**"Seksumado konsider-atas kiel sankta kaj eksterordinara"**

**Kial nur unu?**

Kial ni nur havu unu partneron, kaj devas rin ami ekzakte tiom kiom ri amas nin? Kelkaj diras ke

estas pro praktikaj kialoj. Havi stabilan partneron unuopaman certe povas kelkflanke esti avantaĝa, sed ankaŭ havas plurajn malavantaĝojn limigi sin al nur unu, precipe se oni retenas la postulon pri sammulta reciproka amo. La plej granda problemo pri tiel ĉi aranĝi sian romantikan/erotikan vivon estas ke oni devas elekti inter ĉio kaj nenio. Tio starigas nemoderajn postulojn ke vi devas ami tiun, kun kiu vi kunas, sammulte kiom ri amas vin. Do, se vi "rajtas" nur seksumi kun unu persono, vi devas elekti tiun, kiu plej gravas en via vivo. Sed se oni forlasus la idealon de unuopamismo, pluropamismo ne plu prezentus minacon por amrilatoj. Oni ne plu devas decidi, sed povas havi la kukon kaj manĝi ĝin ankaŭ. La hodiaŭa problemo estas ke se via partnero fikas iun alian, la normo de unuopamismo indikas ke ri volas aŭ intencas finigi la rilaton. Ni devus lerni fidi tiujn, kiujn ni amas. Vere ami iun postulas riski perdi rin. Amo ne estas nul-suma ludo en kiu estas tiel, ke se iu alia gajnas, vi perdas. Ni homoj havas treege kompleksajn bezonojn kaj praktike ne eblas esti "la tuta mondo" por via amato – eble amrilatoj estus plibelaj kaj facile longodaŭraj se vi donuss al la rilaton tiom kiom vi povus, kaj scius ke alia geviro ankaŭ povus kontribui al la feliĉon de via partnero – ĉu ne la feliĉo de via partnero estas ankaŭ via? Ne estas certa kvanto da amo en la mondo kiun ni devas zorge porciumi – ju pli ni amas, des pli da amo ekestos!

**"Jaluzo estas malracia, nedezirata sento"**



**Amo kaj seksumado**

La plejmultaj (kun honoraj esceptoj) opinias ke plej bonas fiki iun, kiun vi amas, kaj iu, kiu amas vin ree. Sed fari neforigebla ligo inter amo kaj seksumado estas ege problemiga, ĉar rezultas ke la sola ebleco seksumadi estas kadre de rilato. Inter du homoj, reciproka, profunda amo estas inter la plej bona, kio povas esti. Kompreneble amo bonegas, kaj eble plej bonas kiam vi amas iun, kiu respondas al viaj sentoj, sed tio ne signifas ke oni ne povas akcepti kaj brakumi malsaman, malplian. Laŭ mi estas, aŭ almenaŭ devus esti, tiel ke ambaŭ gajnas kvankam la amo ne estas reciproka. Gloras ami, kaj esti amata, kaj plej bonas se oni povas kombini la du, sed tion postuli, rezultigas ke la disvolviĝo de fizika intimeco kaj seksumado limiĝas, anstataŭ pligrandiĝi. Tiu, kiu amas iun alian, kaj havas la ĝojon pasigi tempon (eventuale ankaŭ fiki) kun sia amato, devus feliĉi pro tiu ebleco. Same iu, kiu nur estas amata, devus feliĉi pri esti ŝategata, kaj investi nur tiom da tempo kaj engaĝo kiel dezirate.

**Superigo de seksumado**

Postuli unikan amon estas ankaŭ problemo en ke ĝi levas la seksecon al io, kio estas super la ĉiutaga vivo, kaj rezultas ke intimajn rilatojn multe pli komplikiĝas, kaj pli maloftiĝas. Je la nuna stato oni ne povas ekdiskuti seksumado; invito perceptatus kiel timiga kaj preteriro de akceptebla deco, precipe se viriĉo farus la inviton. En tio troviĝas la kerno de la problemo; seksumado konsideratas kiel sankta kaj eksterordinara. Tio katenigas homojn en rilatoj, kaj malhelpas komencigi novajn rilatojn. Vi nur rajtas fiki tiun, kun kiu vi kunas, do, permanenta partnero estas la ununura ebleco fiki. Samtempe tiu ĉi superigo de seksumado rezultigas ke ne-seksaj rilatoj estas pli malfacilaj. Ĉiuspeca korpa intimeco antaŭvidas seksumadon, ĉar ne ekzistas spaco por io meza. Pro la fakto ke seksumado estas tiom neatingebla ekster rilatoj permanentaj, la ebleco havi fizikan intimecon devas, kiam ĝi ekaperas, konduki al seksumado.

**Ĵaluzo**

Tuj ekestanta problemo kiam temas pri pluramajn rilatojn povas esti ĵaluzo, kaj oni povas demandi: kio ĝi estas, kaj de kie ĝi venas? Mia supozo estas ke sentoj kiel envio, kolero, ĵaluzo kaj simile havas ian biologian fundamenton; ekzistas en ni kiel potencialo. Ni povas enamiĝi, koleriĝi aŭ ĵaluziĝi. Sed, denove, kiel tiu sentopotencialo esprimiĝas, se entute okazas, dependas de la kulturo en kiu ni elkreskis kaj la propra personeco. Ĵaluzo implicas ideon kaj senton posedi alian personon, aŭ almenaŭ havi antaŭrangon sur alia ulo. Eble ni povus imagi tute alian socion, kie oni komprenas aĵan kaj homan posedon tutmalsame, kie ĵaluzo en amaferoj ne okazas.

**Eble ni povus imagi tute alian socion, kie oni komprenas aĵan kaj homan posedon tutmalsame, kie ĵaluzo en amaferoj ne okazas.**

Miaopinie, ĵaluzo estas malracia, nedezirata sento, kaj oni devus aspiri forigi ĝin de si. Ĝi kunportas nenion bonan, kaj se oni "trejnus"; paŝ-post-paŝe etendus siajn limojn, eble oni povus transiri tiajn negativajn sentojn.





en niaj propraj manoj kaj ĉiu revo povas realiĝi. Do, faru tion kion vi volas per la vivo, estu ĝi kio ajn! Sed certigu ke vi havos tion kion vi volas, pensu pri ĝi tre zorge unue, kaj kiel havigi al vi ĝin. Analizu la mondon ĉirkaŭ vi, tiel ke vi scios kiuj homoj kaj fortoj laboros kontraŭ viaj deziroj, kaj kiuj estas ĉe via flanko... kaj kiel vi povas labori kune kun ni. Ni estas tie – vivantaj la vivojn plene, atendante vin petvojaĝante pertrajne en Usono, organizante politikajn protestojn en la francaj publikaj lernejoj, skribante belegajn leterojn en la sunleviĝo bangkoka. Ni ĵus finis interami en la banejo de via firmao unu minuton antaŭ ol vi reeniris de via duonhora lunĉpaŭzo. Kaj Vivo atendas vin kun ni, sur la pintoj de negrimpitaj montoj, en la fumo de tendarfajroj kaj brulantaj konstruaĵoj, en la brakoj de amantoj kiuj turnos vian mondon fundon supren. Venu kuniĝu kun ni!

## CRIMETHINC

Tiu ĉi teksto estas produktita de la Crimethinc anarĥiisma grupo – iliaj revuetoj kaj libroj parte inspirigis tiun ĉi publikaĵon, kaj ili neniam ĉesas suprizigi aŭ inspirigi.

Ili interalie publikigis la libron "Tagoj de milito, noktoj de amo" - nepra lego!

Tuj rigardetu www.crimethinc.com!



# VIVO *Estas diferenco inter* kaj TRAVIVO

Kion ajn la medicina profesio diru, estas diferenco inter Vivo kaj Travivo. Esti viva ne nur implicas pli ol korbatado kaj cerbaktiveco. Esti viva, vere viva, estas multe pli subtile kaj grandioze. Iliaj mezuriloj kontrolas sangopremon kaj temperaturon, sed ili pretervidas gajecon, pasion, amon, ĉiujn aferojn kiuj igas la vivon grava. Por igi niajn vivojn denove sencoplenaj, gravaj, por vere elĉerpi la plejmulton de ili, ni devas redifini la vivon mem. Ni devas forpeli iliajn klinikajn difinojn, kaj adaptiĝi al niaj propraj kiuj pli rilatas al tio kion ni sentas.

Laŭ la nuna stato, kiom da vivado estas en niaj vivoj? Kiom da matenoj vi vekiĝas sentante vin vere libera, vibrante viva, preskaŭ ne povante atendi la spertojn de la nova tago? Kiom da noktoj vi endormiĝas sentante vin ĝoja, plenumita, repensante pri la tagaj okazintaĵoj kun kontenteco? Plej multaj el ni sentas kiel se iu jam decidis por ni ĉion, kiel se vivado ne estas kreema aktiveco sed male io kio okazas al ni. Tio ne estas esti viva, nur travivi, esti malmorta. Ni havas funebraĵistojn, sed ili malofte bezonatas, ni havas funebrejojn, sed plejmulte de la tempo ni okupiĝas en niaj oficejaj spacetoj kaj komercaj centregoj, aŭ antaŭ la televidoj. Kompreneble, suburbaj dommastrumantinoj kaj etaj ĉefoj timegas ŝanĝon kaj riskon, ili ne povas imagi ke ekzistas afero pli valora ol sekureco. Iliaj koroj eble batas, sed ili ne plu kredas je iliaaj revoj kaj sonĝoj, Por ne diri kuraĝas postĉasi ilin.

**”Por igi niajn vivojn denove sencoplenaj, gravaj, por vere elĉerpi la plejmulton de ili, ni devas redifini la vivon mem.”**

Sed tio estas la komenco de la revolucio: kelkaj el ni komencas postĉasi niajn revojn, rompante niajn malnovajn vivmodelojn, brakumante tion kion ni amas (kaj en la proceso ekkomprenante kion ni malamas), (tag)revante, demandante, kritikante, agante for de la limoj de rutino kaj normalo. Aliaj vidas nin tiel fari, vidas homojn kiuj kuraĝas esti pli kreemaj kaj aventuremaj, pli donemaj kaj ambiciaj ol ili imagis ebla, kaj unu post unu kuniĝas kun ni. Kiam sufiĉe da homoj akceptos tiun ĉi novan manieron vivi, la pinto de kritika amaso atingiĝos kaj socio komencos ŝanĝiĝi. De tiu momento, la mondo komencos transformiĝon: de la timiga, terura loko kiu ĝi nun estas, ĝis loko plena je eblecoj, kie niaj vivoj estas



**Unuopamismo problemigas pragmatikon**

La moralan superecon de unuopamismo ankoraŭ problemigas la pragmatan praktikon trovi kaj kuni kun hazardan seksumadan partneron – ĉar tio estas iom tabua, devas nepre okazi malfrunokte, post kiam oni tiom multe trinkis ke oni perdis siajn inhibiciojn, devas esti enkondukata per dolĉaj nesinceraj vortoj en rolludo malhonesta, la proceso mem estas rapida renkontiĝo de korpoj kaj la posta morgaŭo vi eble eĉ pentas pri la pasintaĵo. Ne devos esti tiel – ni ne bezonas honti aŭ kaŝi, ni ne faras ion malbonan aŭ fian, ĉu ni ne povas diri al alia persono ke ri estas bela, sen esti ebria, ĉu ni ne povas fiki kun la lumo enŝaltigita, ĉu ni ne povas honeste komuniki kaj sincere intimi – mallonga renkontiĝo povas tamen esti bela memoro longodaŭra!



**Amatoj en pluraj lokoj**

Ĉi-tiuj pensoj pri amo kaj sekseco evoluiĝis dum longa tempo, parte kiel propraj pripensoj, parte per diskutado (sed malmulte kiel praktiko). Mi ne havas klaregan ideon pri kio ekzakte mi volas, sed ne tiom gravas, ĉar mi scias pli-malpli kion mi volas provi, kaj kian vojon mi volas sekvi.


Ĉu eble oni povus havi amatojn en pluraj lokoj, en malsamaj urboj? Se ili estus en la sama urbo, pli facile havus komplikajn konsekvencojn, almenaŭ se oni ne certegas ke oni akceptas ke sia partnero pli preferas pasigi tempon kun sia ekŝatato ol kun si mem. Kiam temas pri nure seksumadaj rilatoj sen aliaj sentoj estas pli facile. Tiam oni ne riskas emocie vundiĝi aŭ ĵaluziĝi, verŝajne la du plej grandaj problemoj. Tie ĉi oni povas multon gajni - ĉu oni havas stabilan kunanton aŭ ne, la mondo atendas vin.

**Loĝi kune/ami kune?**

Alia aspekto grava estas kiel oni pasigas la tempon kun sia elektito. Akorde kun la romantika amidealo, la ĵus enamiĝintaj estu tiom proksime al unu la alia kiel eble, kaj poste kunenmoviĝu kaj establu familion. Ĉar tio ĉi estas tiom dominanta, kaj tre kongruas kun la amidealo, estas malfacile klare vidi kaj malsekvi tiun vojon. Eble estas komprenebla ke oni volas pasigi multe da tempo kun sia amato, sed ofte iĝas frenezjako. Precipe se oni loĝas kune, kaj esti sola aŭ kun aliaj signifas ke oni devas iri for. Ĉu vi vere volas pasigi ĉiun momenton kun via elektito?

Mi aludas al la fakto ke vivi kune kun via amanto povas esti limige. Vivi tiel havas plurajn problemojn gravajn, sed ĉi tie mi nur mallonge mencios tion kion mi preferas. Kiel ĉe la plejmulto de niaj agoj, tradicio kaj moro pligravas ol la libera volo, tiel plej multaj finiĝas en edziĝoj kaj poste en kernaj familoj sen eĉ pripensi la alternativojn. Laŭ mi la kolektiva loĝmaniero malfermigas multajn novajn eblojn.

Ni devus havi multajn rilatojn, je multaj niveloj, kun amikoj, geedzoj, nekonataj kaj nejbaroj... La idealo pri unuopamo, trovi "la ĝustan", devigas nin aŭ centelcente ami unu personon, aŭ tute fordoni la rajton ami. Se oni malfermus la vojon al pragmataj rilatoj; se oni rajtus kunesti kun iu sen ajnja specifaj postuloj pri sentoj, la mondo pli riĉiĝus. Mi kredas ke amo estas grandparte limigita de kion oni riskas. En pli libera, pli malferma mondo estus pli facile vivi en kontentigajn rilatojn, sed ankaŭ tie ne estus tute senŝtona vojo – estas ja niaj vivoj – ili nepre estu kompleksaj kaj interrilataj, kaj tamen belaj.



# KULTURADO POR KRESKI

*Daniel / Svedio (drsgranello@yahoo.se)*

**Kulturado estas natura**


Ĉi tio temas pri la ĝojo kulturi siajn proprajn legomojn. Por mi, kulturado de plantoj estas grava parto de mia vivo, kaj mia kulturado donas al mi energion, ĝojon kaj helpas min kompreni la naturon.En multaj landoj, aparte en urboj, la nuntempa homo ĉiam pli kaj pli malproksiĝas de l' naturo, kvankam la naturo fakte donas al ni la manĝaĵon, kiun ni ĉiutage manĝas. Se oni demandus la nuntempajn infanojn ĉu ili scias de kie venas lakto, kelkaj el ili dirus: lakto venas de laktaĵfabriko. Kelkaj desegnus fiŝan fritpecon, se oni demandus ilin ĉu ili povas desegni fiŝon. En la moderna kaj urbana vivo konsideratas normale ne havi direktan kontakton kun la naturo. Konsideratas kiel pli grave esti bonfunkcianta homo en la publika ekonomi: produkti kaj konsumi. Oni devas fari sian apartan laboron sen pensi tro multe pri aliaj aferoj.

**„ Se oni demandus la nuntempajn infanojn ĉu ili scias de kie venas lakto, kelkaj el ili dirus: lakto venas de laktaĵfabriko."**

Tial, multaj homoj ridas kiam mi diras ke mi kulturas miajn proprajn legomojn. Por ili estas eĉ ridinda afero: produkti sian propran manĝaĵon! Mi ne humiliĝas, sed admitas ke iomete strangas: Kulturi legomojn estas ridinde, sed rigardi televidon tri aŭ pli horojn ĉiutage aŭ ludi golfon estas tute normale.

**Kial kulturi?**

Kial mi kulturas legomojn? Kompreneble ekzistas multaj politikaj kialoj por kulturi sian propran manĝaĵon. La nutroprodukta industrio multmaniere pli kaj pli forlasis la homojn kaj la moralon. Oftas la kazoj, en kiuj la avareco pli gravas ol moralo kaj komuna saĝo. Troa uzado de insektocidoj aŭ genmodifitaj plantoj estas nuntempaj ekzemplo de ĉiu-tempe ĉeestantaj naturaj kaj moralaj problemoj en la plantkulturado.



Laŭ mi, la nuntempaj homoj ofte avaregas pri nutrovaroj. Antaŭ kelkaj tagoj, mi mem aŭdis homo en nia loka magazeno, kiu diris: - Ho! Kiom multekostaj! La terpomoj kostis po 4,90 svedajn kronojn (0,5 eurojn) kilogram! Li estis bonvestita kaj verŝajne li estis en bona ekonomia stato. Kiel li povas eĉ sekunde pensi ke 10 svedaj kronoj estas granda sumo por du kiloj da terpomoj?! Laŭ liaj vestaĵoj, li pretis pagi almenaŭ 1000 aŭ 2000 svedajn kronojn por unu jako. Por mi malfacilas kompreni tian pensmanieron. Kompreneble tia rezono inter la homoj "devigas" la kamparanojn uzi multe da insekticidoj kaj aliajn fiaĵojn por produkti tre malmultekoste.Mi opinias, ke ĉi tiaj politikaj aspektoj de plantkulturado estas interesaj kaj gravaj, sed por mi alia aspekto de kulturado estas eĉ pli grava: kulturi siajn proprajn legomojn estas tiompliriĉigante por la menso kaj animo!

**Miaj spertoj**

Mi havas malgrandan pecon de tereno ekster mia urbo. En la skandinaviaj landoj, oni havas sistemon kiu rajtigas homojn malmultekoste lupreni parcelon en la apudeco de urbo por kulturi. Mia parcelo ne estas granda: eble kvardek aŭ kvindek kvadratmetroj. Eble tio ŝajnas malmulte, sed mi povas certigi vin, ke ĝi donas al mi multe da ĝojo kaj bonaj spertoj!

Dum la plejparto de la jaro miaj plantoj ĉiam iel estas en miaj pensoj. Ofte, kiam mi estas premata de streso pro studado, laboro aŭ aliaj penigaj taskoj – kelkaj horoj en la parcelo donas al mi trankvilecon kaj serenecon. Post tio, mi povas kun pli da energio denove fari aliajn taskojn.Printempe mi semas kaj plantas terpomojn, cepojn, laktukojn, rafanetojn kaj multajn aliajn plantojn. Poste, mi senpacience atendas ke ili ekkreskos el la tero, kiel mirakleto! Finfine, kiam ili ekaperas, mi sentas min kvazaŭ kiel sorĉisto: mi estigis vivon kreskantan el la tero! Mi vidas miajn plantetojn kreski de tag' al tago kaj prizorgas iliajn bezonojn. La kulturado igas min pli observema pri la vetero, la temperaturo kaj la naturo. Pluvtago povas sentiĝi kiel granda savo post multaj tagoj kiam la tero sekiĝis. Miaj kunuloj ofte miras pro mia ĝojo, kiam finfine pluvas!

**Kulturi estas vivi kun la naturo**

Kulturi estas vivi kun la naturo. Mi ĉiutage rigardas ĉirkaŭen en la naturo kaj observas la plantojn, kaj kiel ili ŝanĝas dum la tempo. Somere, post mia laboro, mi



# La marbordana saĝeco

*Tifen / Francio (tiftoof@aol.com)*

En meksika vilaĝeto marborda, ŝipo reeniras la havenon, enhavante plurajn tinusojn. Usonano gratulas la fiŝkaptiston pri la kvalito de liaj fiŝoj, kaj lin demandas kiom da tempo li bezonis por kapti ilin.


«Ne tre longe», respondas la Meksikano.

«Do kial vi ne restis plilonge surmare por kapti pliajn?» demandas la usonano.

La meksikano respondas, ke tiuj kelkaj fiŝoj sufiĉas por vivigi sian familion. Tiam la sonano diras: «Sed kion faras vi cetertempe?»

«Mi leviĝas malfrue, iomete fiŝkaptas, ludas kun miaj infanoj kaj siestas kun mia edzino. Vespere, mi iras al vilaĝo renkonti miajn amikojn, ni drinkas vinon kaj ludas gitaron. Mi havas plenan vivon».

Interrompas lin la usonano: «Mi estas ekonomie diplomita de la universitato Harvard kaj mi povas vin helpi.



Komence, vi devus fiŝkapti plilonge. Kun la gajnita troaĵo, vi povus aĉeti pli grandan ŝipon. Per la mono enspezita dank' al tiu ŝipo, vi aĉetus duan, kaj plurajn ĝis vi havos ŝiparon. Anstataŭ vendi viajn fiŝojn al peranto, vi povos negocii rekte kun la konsumanto, kaj eĉ malfermi vian propran vendejon.

Poste vi povos forlasi vian vilaĝon kaj iri al Meksikurbo, Los Angeles, poste eble eĉ Nov-Jorko, de kie vi mastrumus ĉiujn aferojn viajn!»

Tiam la meksikano demandas:

«Kiom longe ĉio tio daŭros?»

«Inter 15 kaj 20 jaroj.»

«Kaj poste?»

Tiam komencas esti interese, la Usonano respondas ridante: «Je la ĝusta momento, vi povos enborsigi vian firmaon kaj gajni milionojn. »

«Milionojn, ĉu? Kaj poste? »

«Poste, vi povos emeritiĝi, loĝi en marborda vilaĝeto, leviĝi frue posttagmeze, iomete kapti fiŝojn, ludi kun viaj infanoj, siesti kun via edzino, kaj travesperumi drinkante kaj ludante gitaron kun viaj amikoj. »

*Fabelo proponita de Mireille Boin-Gastine en «Perspective non-violente» (neperforta perspektivo)*

# Anarkio en UK

Piĉismo/Gleb Maltsev / Ukrajnio
http://www.pichismo.narod.ru

**mia bel′ estas voĉ′**
**del′ proksim′ del′ kurac′**
**mia mav′ estas knut′**
**del′ kremata sincer′**
**vokas min alumet′**
**al sopir′ al kaput′**
**vidas min via glas′**
**per malpura malgaj′**

**mia saĝo imitas malsekan ovolon**
**del′ akra virino del′ knaka gvardi′**
**mia sola desegno ignoras tavolon**
**del′ kluka psalmaro del′ pufa amas′**
**per ozona mieno mezuru pustulon**
**profetu krediton produktu proleton**
**kaj vekon proletu kaj venon ridetu**
**kaj benon por lerta senfina lepor′**
**kaj subite ekkantu pri via konsci′**
**kaj legome kurtenu pri via konsci′**
**monotonu kloake pri via konsci′**
**kaj ekmiru obee pro bona subito**
**klistero ne helpos al arda inspiro**
**kaj vanas knarado se mankas dentar′**
**por ne plu verŝi sukon sur veŝtan butonon**
**amiku infanoj kun sapo kaj bros′**

**kaj bonguston del′ susuro vekas kluza ligament′**
**kaj kompaton del' anaro karuselas "nova sent'"**
**kojnoforman galaksion zumas blanka injektilo**
**ortodoksan prozeliton kovras nova ornamaĵ′**
**junulara mentoneco blovas laŭtan pulĉinelon**
**menueta lavmaŝino naskas ulon ĉine belan**
**leĝoforta idioto alergias pro vinbero**
**kaj subita makrokosmo kanguruas pri moral′**
**nova zono laŭreatas pri monokla patriot'**
**nova migro kloroformas pri senviva patriot'**
**nova kapo ade pensas pri eterna patriot'**
**nova ordo en latrino ne venkeblas ekde nun**

**ekde nun**
**sekas sang'**
**vanas leĝ'**
**kaj milit'**
**lecion'**
**pri bonkor'**
**estas simpla**
**kutim'**
**kaj legenda**
**hero'**
**putras sur**
**librobret'**
**ekde nun**
**nia mond'**
**ŝuldas al**
**anarki'**

# Por Scii Pli

*Radio Is My Bomb. A DIY Manual for Pirates*. Earth: Hooligan, 1987 [klasikaĵo skribita de britaj anarkiistoj kaj kiu ŝajne ne plu aĉeteblas. Parto de ĝi troveblas en la reto, en "How to be a radio pirate", vd. sube. Inspiraj priskriboj de intaj projektoj k detala teknika sekcio. Notu: ne identa al *Radio is our Bomb*, mise nomata "Radio Is My Bomb" ĉe Rogue Radio Research!]

Teflon, Zeke: *The Complete Manual of Pirate Radio*. Tucson, AR: See Sharp Press, 1993 [libreto, utila, haveblas ĉe Amazon]

Yoder, Andrew and Earl T. Gray: *Pirate Radio Operations*. Port Townsend: Loompanics Unlimited, 1997 [Dika manlibro; tre utila k inspira. Vd. ankaŭ aliajn titolojn de Yoder ĉe Amazon]

Coopman, Ted M.: *Rogue Radio Research* – www.roguecom.com/rogueradio [Paĝaro pri usona *"micro radio"*; tre kvalita]

"How to be a radio pirate" – www.irational.org/sic/radio [Kiel dissendi lokan pirat-radion; ŝajne fidinda k kvalita]

Pri kurtonda pirat-radio: La hejmpaĝo de Radio Alfa Lima – www.alfalima.net [iom senorda, sed utila, se vi sukcesas orientiĝi]

Kelkaj stacioj anarkiismaj aŭ alimaniere maldekstremaj/politikaj: Radio Libertaire (www.federation-anarchiste.org/rl/), Radio Dreyeckland (www.rdl.de), Kill Radio (www.killradio.org), Radio Patapoe (http://freeteam.nl/patapoe; vidu precipe ilian artikolon "Hoisting the Jolly Roger or The Birth of a Station: intro to advanced anti-organizational science in theory and practice"), Free Radio Berkeley (www.freeradio.org)

povas dissendi kontinue la tutan semajnon - kaj kiuj povas uzi nur sufiĉe malfortajn sendilojn (uzo de eksterdoma ricev-anteno ofte ege helpas). Se vi ne estas sufiĉe fortunoza por loĝi en loko kie ekzistas pirato, ne malesperu! Kie ajn vi loĝas vi povas aŭskulti staciojn en la kurtondaj bendoj. Provu inter 6,2 kaj 6,3 MHz en dimanĉa mateno en Eŭropo kaj je 6,955 kHz sabatan vesperon en Usono. Vi certe aŭdos ion (precipe muzik-programojn ofertatajn de hobiuloj teknikumemaj) - se vi havas la ĝustan aparaton kaj antenon! Kurtondaj signaloj (3-30 MHz) reflektiĝas en la jonosfero kaj tial propagiĝas longajn distancojn; en kelkaj kazoj ili atingas la alian flankon de l' planedo!

Se nura aŭskultado ne kontentigas vin, vi povas ja starigi propran dissend-stacion. Ne tiom malfacilas kiom vi eble kredas. Postulatas kelka scio - kaj iom da mono, sed ne multe (da ambaŭ). Pirat-radio estas relative ĉipa kaj senkomplika maniero amas-komuniki. Unue, necesas studio por fari la programojn. En ĝi estu kelkaj mikrofonoj, KD-ludilo, miksilo kaj kelkaj aliaj aĵoj. Sendilon kaj antenon vi povas mem fari - aŭ aĉeti. (Vi prefere sciu iom pri radio-teorio antaŭ eksendo. Piratradio ne estas malpermesata pro nenio.) Kelkaj decidoj por fari: Ĉu dissendi loke per FM (aŭ AM) - aŭ mondskale per kurtondoj? Ĉu riski dissendi *"live"*, rekte de l' studio, aŭ ĉu prefere surbendigi la programon kaj dissendi ĝin poste de sekura loko (meze de ne-penetrebla arbaro kie la agentoj de l' telekomunikaj aŭtoritatoj certe ne kuraĝos veni serĉi vin)? Ĉu dissendi regule? Ĉu reklami la programojn, ekz-e per afiŝoj? Ĝenerale vi devas pesi du ne-akordigeblajn konsiderojn: Indas eviti kapton kaj grandan monpunon - sed ankaŭ oferti regulan, facile troveblan kaj rekoneblan servon al viaj aŭskultantoj.

Se vi volas dissendi spontane kaj ne-regule, vi nepre piratiĝu. Se vi volas oferti regulan, fideblan servon al ekz-e samurbanoj vi eble unue esploru la eblojn fari tion laŭleĝe (*libera radio* je ne necese estu *pirata*, almenaŭ laŭ iuj…). Tiuj ebloj ege varias laŭlande kaj ne estas la temo de tiu ĉi artikolo.

Kai / Norvegio

*La titolo de tiu ĉi artikolo aludas kion respondis belga anarkiisto k radio-pirato Chantal Paternoste kiam ŝi estis intervjuata de la polico pro suspektata enplektiĝo en terorisma aktivado.*






ofte biciklas rapide al la parcelo por akvumi kiam la suno brilegis la tutan tagon. Mi kvazaŭ sentas kiel se la plantoj soifas kiam mi alvenas la parcelon. La tuta proceso de la kulturado fakte igas ankaŭ min kreski. Produkti manĝaĵojn kaj belecon el naturaj ingrediencoj bonfartigas min: semoj, la suno, akvo kaj la uzo de miaj propraj manoj.

Estas ankaŭ ege agrable manĝi memkulturitajn legomojn! Kia ĝuo estas manĝi la unuan rafaneton en la printempo! Vidi la plantoj kreski en suno kaj pluvo plifortigas la manĝsperton. Manĝi ion, kiun oni mem kreskigis – senvenene kaj sen kemisterko – estas mirinda sperto, kiu kreas ligon kun la naturo. Jen mia ideo – kulturado de propraj legomoj kaj konsumado de tiaj legomoj kreas ligon inter la naturo kaj la vivo. Mi opinias, ke homoj kiuj komprenas la naturon kreskas mense kaj anime. Ĉu ŝajnas strange?La somero progresas kaj mia parcelo eksplodas en koloroj, odoroj kaj gustoj. Apud mia parcelo aliaj homoj ĝojiĝas en siaj ĝardenoj. Ni, kiuj kulturas tie, dividas komunan intereson, kaj ni multe babilas pri kulturado kaj pri aliaj aferoj. Estas ankaŭ tre interese, ĉar multaj el tiaj homoj venis ĉi tien el aliaj landoj. Iu tago maljunulo el Ukraino parolas pri siaj cepoj kaj pri la beleco de Kievo, alia homo el Afganistano montras siajn strangajn bonodorajn plantojn al mi, kaj poste demandas ion pri nia sveda socio.Jes, mi havas tre agrablan tempon en mia parcelo kun la plantoj kaj la homoj. Kaj pro tio, mi volus admoni al ĉiuj provi kulturi. Se vi ne jam provis, eble vi malkovros novan mondon! Eble plaĉos al vi, eble ne. Mi ne scias, sed por mi, la planta mondo estas mirinda mondo.

Bedaurinde, homoj ofte pensas ke kulturado de plantoj estas malfacile, sed ne veras. Fakte tre facilas! Ĉiuj povas kulturi plantojn. Certe oni foj-al-foje malsukcesas, sed tiam oni nur devas provi denove. La suno leviĝas ĉiutage!



# Tiel ĉi vi afiŝas

*Magda / Svedio (blubbfisk@hotbrev.com)*

**Ĉiuj havas dirindaĵojn.**

**Ne ĉiuj havas monon por reklamejoj.**

**Ne gravas.**

Vi bezonas:

tapetogluo

rulilo aŭ larĝa peniko

sitelo

afiŝoj

En vendejoj kiuj vendas farbon aŭ konstrumaterialon aĉeteblas tapetogluo. Tio estas pulvoro kiun oni miksas kun akvo, kaj ĝi estas sufiĉe malmultekosta. Se tapetogluo ne haveblas, laŭdire terpoma faruno funkcias similmaniere. Vi ankaŭ povas provi uzi tapiokan aŭ rizan farunon. Mano da sukero kutime igas la gluon pli efektiva, kaj salo malhelpas ĝin glaciiĝi se estas minusgradoj ekstere.

Verŝu la gluon en sitelon. Plasta bareleto kun eltranĉita truo en la flanko ankaŭ funkcias. Unue, sternu tavolon de gluo per la peniko sur la muro, lumstango aŭ simile. Post tio surmetu vian afiŝon singarde kaj surglittuŝu ĝin (aliokaze la papero facile sulkiĝas). Ŝmiru gluon sur la afiŝon. Zorgu ke neniuj anguloj estas deiĝintaj, ĉar tial pli facilas ĝin fortiri.

Pensu strategie kiam vi afiŝas. Elektu bone videblaj lokoj kie multe da homoj trapasas. La afiŝoj devus esti grandaj, almenaŭ formato A3. Antaŭ vi komencas, vi povas volvi viajn afiŝojn tiel ĉi: Volvu la unuan, sed lasu angulon. Metu pecon de la sekvonta afiŝo ene de la angulo kaj daŭrigu la volvadon. Faru tiel kun ĉiuj. Fine havas vi grandan rulaĵon kaj vi povas eltiri la afiŝojn po unu. Nun estas pli facile manipuli ilin.

Afiŝado estas plimalpli malpermesita en plejmultaj lokoj. Mi proponas ke vi faras tion post la apero de la mallumo. Vestu vin diskrete, kaj havu ĉiujn aĵojn kaŝitajn en ekzemple plastsaketoj. Estu almenaŭ du, tiel ke unu povas rigardkontroli la cirkonstancojn kiam la alia afiŝas.

# LA MOVADO DE LA SEN-TERULOJ

***– kritika perspektivo de partopreninto***

*Kristine kaj Sveinung / Norvegio (sveinung.legard@demalt.org)*

**Multaj karakterizas MST kiel unu el la plej gravaj sociaj movadoj en la hodiaŭa mondo, kaj diratas ke ĝi estas herbradika kaj antikapitalisma. Dum kvar monatoj ni loĝis kaj laboris kun MST en la kamparoj brazilaj, kaj nun provos respondi al la demando kiom bone kongruas la karakterizo supra kun niaj impresoj?**

Super la MST-loĝarejo Ouro Verde la suno leviĝas. La kokoj krias kaj defore aŭdiĝas azenoj. Bicikle aŭ ĉevale la unuaj viroj jam alvenis la kampon, dormeme ili komencas fosadi. Post iom da tempo alvenas pli kaj pli da ili, kaj baldaŭ ilia vigla babilado aŭdeblas de mangoarbo al gojav-arbareto.

**Neniaj ŝancoj por la estonteco**

La loĝarejo Ouro Verde troviĝas en unu el la plej sekaj regionoj de Brazilo sur la t.n. Sertão en la federacia ŝtato Pernambuco. Plej multaj el la Ouro Verdeaj enloĝantoj antaŭe laboris en la samnomata grandbieno. Brazilo estas unu el la malmultaj landoj kiuj ankoraŭ ne havis terposedan reformon. Gigantaj terposedaĵoj iĝis distingilo brazila. Dum pluraj milionoj de la brazila enloĝantaro vivas ĉe la limo de malsato, absurdas la fakto ke duono de la kultivebla tero estas nekultivata.

La grandbieno Ouro Verde tamen bankrotis, kaj subite 5-600 familioj restis sen laboro aŭ manĝaĵo. Multege da brazilanoj vivas sub similaj kondiĉoj. 53 milionoj da homoj, triono de la landa loĝantaro, vivas sub la malriĉolimo de la Unuiĝintaj Nacioj. 23 milionoj da homoj vivas en akuta mizero. La ŝancoj por la estonteco do ne tiom bonis por la familioj Ouro Verdeaj. Sed anstataŭ iri al la plej proksima urbego por provi trovi laboron tie, la familioj organiziĝis per MST, la movado de la sen-teruloj.

**Okupacioj por tero**

MST nur 1994 alvenis Sertãon. Tiutempe la regiona MST-kunordiganto, Milton Lewy, sola trabiciklis kvardekgradan varmegon por rakonti al la senteruloj pri iliaj rajtoj. Komence grandis la skeptiko, kaj nur sep-ok personoj alvenis al la aranĝitaj renkontiĝoj. Sed iom post iom la homoj komencis kredi je si mem kaj MST, kaj aranĝiĝis popolrenkontiĝoj kun ĝis 1000 partoprenantoj. Rezultis granda okupacio de la latifundio Safra 1995, partoprenis 2200 familioj. De tie la homoj disvastiĝis al malpli grandaj okupacioj proksime, interalie okupiĝis la neaktiva grandbieno Ouro Verde. Dum du jaroj la familioj estis devigataj vivi ĉe ekzistominimumo en kamparo konsistanta el ter-kabanetoj, ĝis la brazila agrar-aŭtoritatoj promesis al ili teron kaj monpruntojn.


**La MST-kunordiganto Milton Lewy sole trabiciklis kvardek gradan varmegon por rakonti al la sen-teruloj pri iliaj rajtoj.**

Similmaniere la sen-teruloj komencis okupacii kampojn sub la militista diktatoreco en Brazilo. La ekonomia krizo fine de la 70-aj jaroj haltigis la landan industriiĝadon, kaj la malkontento kaj lukto kontraŭ la diktatoreco kreskis. De 1978 ĝis 1983 okazis pluraj grandaj terokupacioj en la tuta lando, sed ĉiuj okazis je loka nivelo, sen ia komuna kunordigo. Helpe de radikalaj estroj ene de la katolika eklezio okupaciantoj el la tuta lando ariĝis en renkontiĝoj por diskuti kiel oni povu fondi organizon kiu povos disvastigi la luktojn kaj kunligi la lokajn konfliktojn en pli granda lukto por terposeda distribuado. 1984e MST organizis sian unuan nacian renkontiĝon kaj poste kreskis ĝis la plej granda kampara movado en la hodiaŭa Latin-Ameriko.

**Mondkonata movado**

Multaj karakterizas MST kiel unu el la plej gravaj sociaj movadoj hodiaŭaj, ĉar ĝi sukcese organizis la plej subpremataj brazilojn en herbradika,





la 1920aj kaj 30aj la sinteno ŝanĝiĝis, kaj en Okcident-Eŭropo radio-dissendado rezerviĝis al la ŝtatoj, kiuj volis uzi ĝin por popolinstruaj celoj, – dum en Usono, kie la politika tradicio malpermesis tian transprenon fare de la ŝtato, la radio-servoj restis privataj. En kaj Eŭropo kaj Nord-Ameriko radio-komunikado estas forte regulizita ekde la 20aj; por dissendi radion necesas en ambaŭ kazoj permeson de koncernaj aŭtoritatoj.

Eble pro malsamaj leĝoj estas diferenco inter eŭropa kaj usona pirat-tradicioj. En Eŭropo pirat-radio estis ĉiama fenomeno. Unue, ankoraŭ senpermese dissendadas entuziasmuloj – plej ofte sur pure hobia sed kelkfoje ankaŭ komerca bazo. Alia grupo de piratoj estis la aventuremaj kapitalistoj kiuj rompis la ŝtatan monopolon en la 60aj per dissendo de pop-muziko kaj reklamaĵoj de ŝipoj ankrantaj en internaciaj akvoj. Konkurantaj nur kun Radio Lŭembourg, la mar-piratoj ege sukcesis – ĝis venis novaj leĝoj (naciaj kaj en formo de internaciaj konvencioj) kiuj metis finon al ili. Hodiaŭ oni konsideras ilin pioniroj de privata komerca radio en Okcident-Eŭropo. Poste, en la 70aj, venis ondo de politikaj aŭ loke engaĝitaj pirat-radioj, ofte influitaj de anarkiismo. Elstaraj kaj legendaj ekzemploj: Our Radio en London, Vrije Keizer Radio en Amsterdam, Radio Alice en Bologna, Radio Dreyeckland apud Freiburg kaj Radio Libertaire en Paris (la du laste menciitaj ankoraŭ ekzistas, sed nun de longe ili supozende havas licencon. Kaj ili dissendas en Esperanto!!). En la 90aj venis nova ondo de FM-piratoj en multaj eŭropaj urboj, precipe en London. Ligita al la *”rave”*- kaj *”dance”*-medio, tiuj ĉi piratoj dissendas elektronikan muzikon kaj reklamas *”rave”*-festojn. En Eŭropo pirat-radio verŝajne iom malpli oftas nun ol antaŭe, pro la falo de l’ ŝtataj monopoloj.



En Usono radio estis relative libera kaj ne-centrigita kaj ne ekzistis bezono de ribelado. La ŝtato apenaŭ ludis rolon. Tamen, en la malfruaj 80aj io okazis. Radio-dissendado en Usono pli kaj pli subiĝis kontrolon de grandaj amaskomunikaj kompanioj kaj dissendad-ĉenoj. Centre produktataj, glataj kaj sen-animaj programoj prenis la lokon de lokaj, sendependaj radio-stacioj. Por starigi stacion bezonatis granda monsumo por aĉeto de frekvenco. Reago ne povis ne veni: Ĉie en Usono aperis kontraŭ-leĝaj *”micro radios”*, lokaj FM-stacioj dissendantaj loke kaj per malfortaj sendiloj. La pioniroj de tiu ĉi movado estis Free Radio Berkeley (CA) kaj Black Liberation Radio (Springfield, IL). Forte influita de anarkiisma pensado sed ankaŭ ligita al la ĝenerala Usona liberala maldekstro, la movado iom sukcsesis: En 2000 la Federal Communications Commission rezignis pro la premo kaj donis (kvankam tre malgrandskale) licencojn al malgrandaj, lokaj radio-stacioj. Kompreneble, ne ĉiuj *”micro radio”*-aktivistoj vidas benon en tio. Ĉar iel la movado nun estas dividita kaj iom perdis de sia forto. Oni ja venkis nur parton de l’ batalo: Estas jes (iomete) pli facile kaj ĉipe ol antaŭe ekhavi licencon – sed ankoraŭ endas kontraŭbatali la dominon de l’ *”corporate media”*.


KION FARI POR AŬSKULTI KAJ POR DISSENDI?

Se vi havas piraton en via najbarejo vi facile malkovros tion. Uzu la agordilon de via FM-radio! Memoru ke la piratoj estas normalaj homoj kiuj ĝenerale ne

# Our Radio kaj Kill Radio – Du Generacioj De Anarkiisma Pirat-Radio

Jen du ekzemploj kiujn mi supozas inspiraj por anarkiistoj: Our Radio, eter-pirato en London en 1982-83 kaj Kill Radio, ret-”pirato” de Usono. Our Radio komencis regule dissendi en februaro 1982 per malforta mem-konstruita sendilo. Ĉiuj programoj estis surbendigataj kaj dissendataj de ĉiam novaj lokoj, precipe de supre de altaj domegoj en centra London. La stacio havis neniun formalan estraron; oni agis laŭ la principo de konsentismo, kiel tre ofte faris anarkiistaj piratoj okcident-eŭropaj tiu-tempaj kaj kiel daŭras fari usonaj *micro radios*. En la komenco ĉio iris relative glate: Oni evitis kaj kapton fare de la aŭtoritatoj kaj internajn disdividojn kaj malakordojn. Nura problemo estis manko de aŭskultantoj! Ne estas facile por malgranda, nova, anarkiisma (eĉ!) stacio akiri aŭskultantaron. Oni devis batali por ĝi. Ĉiun merkredon vespere oni dissendis programojn politikajn, muzikajn, porvirinajn, porgejajn kaj ĝenerale ekcentrikajn... Post jaro venis reago de l’ aŭtoritatoj: Post pluraj kaptoj kaj preskaŭ-kaptoj en sinsekvaj semajnoj, Our Radio fine perdis sian lastan funkciantan sendilon en marto 1983 – kaj havis nek monon nek emon daŭrigi.

Kill Radio estas ”alternativa”, politika radio en la tradicio de l’ maldekstremaj *micro radios* – sed diference de tiuj ĉi ĝi dissendas en la interreto anstataŭ etere. Supozeble ili faras tion tute laŭleĝe (kvankam ja ekzistas leĝoj malobeeblaj ankaŭ ĉi-rilate). Simile al la antaŭaj anarkiismaj eter-radioj Kill Radio estas organizata laŭ principoj de konsentismo, t.e. ke neniu estraro estas, sed ke ĉiuj decidoj faratas per interkonsento post longaj diskutoj. Vd. ilian retpaĝon por vidi kiel ili faras (ĉio tre detale priskribita!). Kill Radio iel rilatas al la Independent Media Centers-movado kiun oni trovas ĉie en la mondo kaj kiu fervore kontraŭbatalas kapitalisman





antikapitalisma kaj socialisma movado. Kiom bone tiu ĉi karakterizo kongruas kun la spertoj kiujn ni akiris dum nia kvarmonata restado loĝante kaj laborante kun MST en Sertão?

**Demokratio**

Ĉiuj MST-unuoj – la kampoj kaj loĝarejoj movadaj – funkcias en baze herbradika maniero kun plenkunsidoj agantaj kiel plej alta demokratia instanco. Pluraj loĝarejoj kaj kampoj ankaŭ organiziĝas per grupoj de ĉ. 30-35 familioj. La intenco estas ke tiuj ĉi familigrupoj estu ”etaj plenkunsidoj”, en kiuj pli da homoj havu la eblecon paroli. Brazilo estas granda lando kaj la varioj inter organiza kutimo en diversaj regionoj povas grandi, sed la ĉefa celo komunas: ke la loĝantoj mem regu.



Ni tamen observis ke tiuj ĉi kunsidoj povas esti malbone organizitaj kaj tio fine rezultas ke malmulte da homoj partoprenas en la decidprocezo. Brazilo estis antaŭ nelonge sklava socio, kaj la ordinaraj homoj malmulte spertas pri demokratia organizado. La rezulto, laŭ Jefferson Vanzella, loka MST-kunordiganto en la federacia ŝtato Pernambuco, estas ke la subprematoj emas imiti la subpremantojn. Pro malamata devigo ŝtata, ĉiu MST-loĝarejo devas elekti prezidanton, kaj plurfoje tiuj prezidantoj oportune havigis al si mem certajn avantaĝojn – i.a. ekonomiajn – kiuj subfosas la loĝarejan egalecon.

Eĉ se plenkunsidoj estas la plej altaj demokratiaj instancoj en la kamparoj, la plej gravaj strategiaj kaj politikaj decidoj MST-aj faratas de elektitaj estrar-kolektivoj lokaj, federaciŝtataj kaj naciaj. MST do ne havas ”malhierarkian strukturon” kiel kelkaj eksterlandaj komentistoj emis aserti.

Dum la lastaj jaroj MST laboregis por reteni la identigon de la movado kaj la lukton je herbradika nivelo. Kelkaj loĝantoj – kaj eble specife tiuj sur la sekega Sertão – rigardas MST kiel ion fremdan kaj superrangan de al? si mem. Tion pli ol ion ajn kaŭzis la ekonomia krizo en kiu MST troviĝis, kiu rezultigis ke aktivistoj tutsimple ne povis viziti loĝarejojn aŭ distribui materialojn movadajn. Aliflanke MST emfazas edukadon de aktivistoj – kiuj povas sin centelcente dediĉi al la ”lukto”. Tiel la MST-identeco pli fortas ĉe la aktivistoj ol ĉe la herbradiko.

**Anti-kapitalismo kaj socialismo**

MST luktas por ”tero, terposeda reformo kaj socialismo” kaj tre klare kontraŭstaras la novliberalisman politikon de IMF, la Monda Banko, kaj la planata amerikana liberkomerca zono. Aliflanke ili malpli skeptikas pri nacia kapitalo, kaj luktas por ”Projeto Popular” (popola projekto) kiu interalie inkluzivas plifortigon de la nacia ekonomia sendependenco brazila.

MST deziras kolektive disdoni la teron. La ideologio tielas: Neniu povas posedi la teron, kaj la rolo de la kamparanoj estas administri la teron nome de la komunumo. Tial la movado volas startigi kooperativojn en kiom eble plej multaj loĝarejoj, distribuante la enspezojn kaj rimedojn inter la partoprenantajn familojn, alternative al la tuta loĝarejo.

Kolektiva kultivado okazas ne nur per kooperativoj, sed ankaŭ per spontana distribuado de manpovo. ”Reciproka helpado – vi helpas min iutage, mi helpas vin alitage – ankaŭ estas formo de kolektivigo”, diras Jefferson Vanzella.

Brazilo tamen estas kapitalisma socio, kie la privata posedrajto altstatusas. MST ne povas nek volas devigi la sen-terulojn kiuj aliĝas al ilia movado kolektivigi la teron ricevitan de la registaro. Plej multaj sen-teruloj eniras la lukton revante pri propra terpeco, kaj tial plejmulte da MST-loĝarejoj estas famili-bazataj.

Sed la avantaĝoj de kolektiva kultivado ne nur ideologias, individua kultivado povas havi tre maloportunajn konsekvencojn. Kio okazas se familio ricevas nekultiveblan terpecon? Se la familipatro malsaniĝas kaj ne povas labori? Se la plej maljuna familiano troaĝas por prilabori la teron?

Fine oni devas demandi sin kian socialismon MST vere volas. La movado tre emfazas ideologian malfermecon. ”Por ni gravas ne havi ortodoksan ideologion. Tial ankaŭ ne ekzistas dokumento en kiu tia ideologio skribitis. Ni pli emfazas ke

ni ĉiam ion novan lernas, ekstraktas tion kio gravas por ni kaj enigas ĝin en nian praktikon", diras Jaime Amorim, unu el la federaciŝtatestroj de MST Pernambuco. Sed inter la pensuloj kiuj plej ofte troviĝas en la movadaj tekstoj estas personoj kiel Lenin, Mao, Fidel Castro kaj Ho Chi Minh...

### Ekologia terkultivado kaj virina egaleco

MST laboras pri virinaj aferoj, kaj volas entiri virinojn je ĉiu nivelo de la movado. De partopreno en komitatoj, plenkunsidoj kaj la kultivado de la kampara tero kaj la loĝarejoj, al aktivado en diversaj sferoj kaj partopreno en estraroj loke, regione kaj nacie. Samtempe problemas la vasta vir-ŝovinisma kulturo brazila. Tio respeguliĝas en la movado, en kiu viraj estroj kaj aktivistoj ofte varme priparolas virinan egalecon, sed praktike tre malvolonte ion faras. Krom la nacia estraro, en kiu kvardek elcentoj virinas, estas ĉefe je herbradika nivelo ke virinoj ludas gravajn rolojn. En la meznivelaj estraroj malmultopas ilia partopreno.

Brazilo estis devigita intensivigi la -ekstraktadon de krudaĵoj eksporten kaŭze de la landa ekonomia krizo. Tio ĉi kaŭzis gravajn ekologiajn damaĝojn, interalie senarbarigon, ter-erozion, akvomankon kaj polucion. MST ĉagreniĝas pro tiu troekspluatado de la naturo kaj trouzo de kemiaĵoj kultive. La celo estas ke ĉiuj MST-loĝarejoj kultivu ekologie.

Kontraste al la regionoj en la nordoriento kie ni troviĝis, ekologia kultivado estas labormetodo vastigita en la sudo. Por povi kultivi la teron sen uzo de sanminacaj kemiaĵoj la MST-loĝarejoj bezonas teĥnikan asiston, sed la ŝtataj registaroj dum la lastaj jaroj ne plu subvenciis tiajn ĉi projektojn, kaŭzante ke la konvenciaj toksikaj kultivmetodoj daŭre uzatas.

### Solidareco

Ni povis sperti deproksime la kamparan vivon brazilan – tute ne idilio, male estas lukto kontraŭ sekeco, malsato kaj grandegaj nepagitaj elektraj fakturoj. En la loĝarejo Ouro Verde la familioj ankoraŭ ne ricevis la registaran paperon, dirantan ke ili posedas la teron, kiu estis promesita al ili antaŭ pli ol kvin jaroj. Hodiaŭ la eksteraj malhelpoj povas ŝajni nesupereblaj, kaj niaj novaj amikoj en Sertão penege laboras tag-al-tage por pluvivi. Ĝuste tial ili meritas nian solidarecon kaj nian aktivan partoprenon en la lukto por diversa kaj plibona mondo.

**MST - Movado de Sen-Teruloj**

- MST signifas "Movimento dos Trabalhadores Rurais Sem Terra"
- Karakterizatas de multaj kiel unu el la plej gravaj sociaj movadoj en la hodiaŭa Latin-Ameriko
- Ekzistas en 23 el la 27aj federaciaj ŝtatoj brazilaj
- Luktas por "tero, terposeda reformo kaj socialismo"
- Per okupacioj kaj demonstracioj volas influigi la registaron plirapidigi la terposedan reformon.
- Havigis teron al ĉirkaŭ 350.000 familioj ekde la fondiĝo 1984a.
- Hodiaŭ ĉirkaŭ 100.000 familioj loĝas en MST-kamparejoj atendantaj teron.








PRI PIRAT-RADIO EN EŬROPO KAJ NORD-AMERIKO

Vi nun tenas en viaj manoj gazeteton, rezulton de entuziasma laboro de grupo diletanta kaj de sufiĉe spontana iniciato de iuj agemaj norvegoj. Certe ne profesiega aŭ brilpapere presita, sed des pli animoza kaj delektinda. Ĉu vi sciis ke ekzistas similaĵoj sur la ondoj Hertz-aj? De l' naskiĝo de l' radio-komuniko, entuziasmuloj dissendas alternativaĵojn al etaj aŭskultantaroj siaj. Ofte ili devas fari tion kontraŭleĝe – *pirate*.

PIRATRADIO KAJ LIBERA, "ANARKIISMA", RADIO

Piratradio estas radio-dissendado kontraŭleĝa, ĝenerale celanta ordinaran aŭskultantaron. Piratradio estas uzata por politikaj celoj de ĉiuspecaj grupoj kaj organizaĵoj – kaj eĉ de registaroj (kiuj ne malofte malobeas internaciajn konvenciojn radio-komunikajn); ĝi estas uzata por gajni monon en lokoj kie komerca radio leĝe ne allasatas; ĝi estas uzata de religiaj fanatikuloj por dissemi siajn torditajn mesaĝojn; kaj ĝi estas uzata de hobiuloj kiuj ŝatas regali siajn amikojn (aŭ nekonatojn) per bona muziko, humuraj programoj kaj teknike bonaj signaloj.

Ofte oni distingas inter *pirat-radio* kaj alia koncepto, nome *libera radio*. *Libera radio* estas politika, ideologia koncepto ofte ligita al anarkiisma pensado. Libera radio (laŭ unu kutima uzo de la vorto) estas radio sendependa kaj de la ŝtato kaj de la kapitalisma merkato – kaj kiu iel estas engaĝita en politikaj aŭ sociaj aferoj. Kontraste al plej multaj pure hobiaj piratoj, la liberaj radioj penas oferti regulan, fideblan servon al siaj aŭskultantoj – sen tro kaŝi sin kaj sen tro zorgi eviti persekutadon fare de la aŭtoritatoj. Oni ofte priskribas liberan radion kiel "elektronikan civitanan malobeon". Tre ofte liberaj radioj organizatas laŭ anarkiismaj aŭ konsentismaj principoj. (Tiu maniero organizi sin ne nur estas "politike korekta", ĝi ankaŭ estas la plej taŭga por kontraŭleĝa radio-stacio: Per tia organizado eblas daŭrigi la dissendadon post eventuala kapto de kelkaj kunlaborantoj – kaj estas tre malfacile por la aŭtoritatoj trovi "ĉef-responsulojn" kaj severe puni ilin.)

Nu, supozeble ĉiuj bonaj anarkiistoj (kaj la leganto) povas elkovi mil bonajn kialojn starigi liberan radion aŭ dissendi pirate (anstataŭ ekz-e peti dissendpermeson de l' aŭtoritatoj – kio nun teorie eblas ĉie en Okcident-Eŭropo, post la falo de l' ŝtataj monopoloj). Do mi lasas la ideologian flankon de l' afero kaj provos sube skizi pirat-radion kiel faktan, ekzistantan kaj -intan fenomenon en Okcident-Eŭropo kaj Nord-Ameriko. – Kaj esperas ke tio povas inspiri kaj esti kontribuo al... io! Tiu kiu volas legi pri kritiko de amaskomunikiloj, pri anarkiismaj amaskomunikaj strategioj aŭ pri manerioj anarkiisme organizi radio-stacion, konsultu ekz-e libron de Noam Chomsky aŭ la retpaĝojn de Kill Radio (anarkiisma ret-radio) aŭ de Rogue Radio Research.

DU TRADICIOJ PIRATRADIAJ: EŬROPO KAJ USONO

Jam en la genezo de l' radio-komunikado komence de l' lasta jarcento ekzistis prauloj de l' nunaj piratoj. Ĉie en Eŭropo aperis malgrandaj, lokaj stacioj, ofte pure hobiaj. Komence la ŝtatoj ŝajne ne vidis la eblojn de radia amas-komunikado kaj lasis la kampon al (oni opiniis) utopiaj entuziasmuloj. Sed en